

1981 januaro
Esperanto
74-a jaro

n-ro 901 (1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Brazilo kantas prepare al la 66a UK

Vi trovos,

konsterne malfrue ĉi tiun revunumeron en viaj manoj. Ni ŝuldas al vi nekuti-me grandan pardonpeton. Kaj, jen, havu ĝin! Se la problemoj tiel facile solv-eblus, kiel facile vortoj fluas!? Serioze nun, kial la prokrasto kaj kiom longe ĝi daŭros ankoraŭ? Pro la okupiteco de la redaktoro pri ne-revuaj laboroj. Li nun iom liberiĝis kaj preskaŭ komencis spiri. La februara numero venos al vi ankoraŭ malfrue, la marta eble malfruetos, sed vi vere surpriziĝos kiam la aprila numero venos al vi tiel frue, ke vi eĉ rifuzos kredi tion. Nun, ni lasu tiujn pardonpetojn kaj promesojn. Kio pri la numero en viaj manoj? Ĝi estas riĉa kaj interesa. Legu kaj pridiskutu ĝin kun viaj najbaroj. Cetere, salutu la najbarojn de ni. Se ili miros pri la saluto, ĉar ili neniam aŭdis pri Esperanto, estas tempo, ke vi rakontu ion al ili pri tiu temo. Serioze. Ĝis baldaŭ!

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA: Fortaj por ĉia defio (Grégoire Maertens)
- 2 Esperanto kaj turismo: Kio okazu post Manilo? (F. Szabó-Felső)
- 3 Libro: (Re)aperis "Plena analiza gramatiko de Esperanto"
- 4 Kunsido de la Estraro de UEA: Baldaŭ la kvara oficejo
- 6 Reagoj: Ne ekzistas sciencaj majstroverkoj (Bruce Arne Sherwood); Iniciatoj: Malto en Jugoslavio (Spomenka Štimec)
- 7 Nekrologo: Forge ne plu vivas
- 8 Brazilo: Esenca kongrespreparoj
- 9 La dua interlingvistika seminario en Germana Demokratia Respubliko: Lingvosciencistoj ja interesiĝas pri Esperanto (Detlev Blanke)
- 10 "Kastoroj" kaj "Geonkloj": Kiuj instruas la infanojn? (J.H. Sullivan)
- 11 Post la Infana Kongreseto en 1980: Estis bele en Elvskogen (Alja Öfors)
- 12 Recenzoj: "Nuancoj" de K. Szczurek kaj L. Gabrielli (B. Kolker); "Al abelujo ĝi flugas" de Juhan Liiv / Hilda Dresen (W.A.M. v. Heugten); "Tri noveloj" de Stjepan Krčmar / Josip Velebit (Mauro Nervi)
- 13 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 14 TEJO-paĝo: Eksteraj rilatoj de TEJO: De Strasburgo ĝis Bangaloro kaj reen (S. MacGill); Labortendaroj: Ĉu vi planas labore tendumi?
- 15 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 17 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 18 Nekrologoj (T.T. Anuruddha, N.J. Campbell, M. De Elezcano y Maiztegu, S. De Geus, G. Gamberini-Billi, I. Jarc, E. Medišauskas-Medonis, A. Mikk, M. Proctor, A. Pinto, W.F. Rentmeister, H.P. Saunders, J. de Skotte, A. Slanina, J.J.P. Stitz, L. Tell)
- 19 Ekzameno E (Bernard Golden)
- 20 Anoncetoj

La kovrilo

Ke "Brazilo kantas", kiel diras nia kovrila titolo kaj malnova (1970) ankoraŭ aĉetebla Esperanta disko, tio estas nenia novaĵo. Tie ja estas Rio kaj ĝia kar-navalo, kiu fakte estas simpla vakuo plenŝtopita per la mirakla fluido de dan-co kaj kanto, ĉiaspecaj. Nu, renkonte al la venonta karnevalo kaj precipe al la ĉi-jara Universala Kongreso en Brazilio, oni dum la lastaj monatoj kantas en Esperanto tie. Jam aperis tri novaj Esperanto-diskoj en Brazilo, kaj pliaj atendas nur la finpreson de la kovriloj. Ĉefe temas pri la teamo de nia bildo (de maldekstre): Sylla Chaves, Amâncio Cardoso, Joel de Castro, Franca Fene-ti, Nadir de Oliveira kaj Maria Alice Cabral (sidanta ĉe la gitaro). Dum unu el niaj lastatempaj vizitoj al Brazilo, ni hazarde ĉeestis provludon de Joel por nova disko. Nu, ni neniam aŭdis pli bonan Esperantan kantadon de neespe-rantisto. Intertempe Joel de Castro lernas la Internacian Lingvon. Ni flustris al li, ke tiel eblos kanti ne nur dum la 66a UK en Brazilio sed ankaŭ dum la 67a en Antverpeno, kio al li sonis kiel tre ekzotika vojaĝebleco.

esperanto

Oficiala organo de Universala Espe-ranto-Asocio, Nw Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 91 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (kon-to n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj, edukado kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadel-phia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Fortaj por ĉia defio

OFTE NI EGE MIRAS pri la manko de informiteco ĉe nemovadano pri la lingvo Esperanto kaj pri la evoluo de la tutmonda Esperanto-movado. Ĉar ni mem tute konsciiĝis pri la valoroj de la Internacia Lingvo kaj pri la eblecoj de niaj organizaĵoj, ni ofte opinias, ke la tuta homaro konas la samajn faktojn kiel ni, sed ke ĝia negativa sinteno al la Internacia Lingvo baziĝas sur indiferento aŭ eĉ sur malbona volo. Tamen, se ni senemocie pripensas la situacion, en la monda skalo, kun aparta atento al la informado niaflanke, ni konstato la neefikecon de la ĝisnunaj klopodoj informi la plej vastajn homamasojn. Niaj agadoj kaj kampanjoj ĉi-rilate estis tro malgrandskalaj aŭ tro ne kunordigitaj.

La rimedoj, kiuj alportus sukceson en ĉi tiu kampo, estas duoblaj: unuflanke, necesas ke centra instanco gvidu kaj konsilu, kaj, aliflanke, ni bezonas apliki novstilajn labormetodojn.

Vero estas, ke la oficistaro de la Centra Oficejo, la motoro de Universala Esperanto-Asocio, jam en si mem devus konsistigi la menciitan centron. Tamen, ĝis nun la Centra Oficejo dediĉis preskaŭ la tutan disponeblan tempon nur al la esperantistoj mem: administrado, librotenado, redakciaj kaj grafikaj laboroj, korespondado, kongresoj ktp. Estis kaj estas necese okupiĝi pri ĉiuj ĉi laboroj, sed tio rezultigis tempomankon por dediĉi atenton al la eksteraj rilatoj,

informado, eldonado ktp. Kvankam estraranoj kaj komisionoj aŭ komisiitoj klopodas plenigi la vakuon per sia intensa laboro, ni ne sukcesis ĝisfunde organizi kaj mobilizi la movadajn kaj ekstermovadajn fortojn sur la informa laborkampo.

La Estraro kaj la Komitato de UEA konscias pri tiu baza problemaro rilate la informadon kaj jam de jaroj serĉas adekvatan solvon en la limoj, kiujn starigas la asocia buĝeto. Kelkajn fundajn renovigojn de la informaj metodoj oni retrovas kvazaŭ koloran fadenon tra diversaj protokoloj, raportoj kaj artikoloj. Ni povas sekvi tiun fadenon ankaŭ tra la Financa Programo, Nov-Jorka Oficejo de UEA, Eŭropa Esperanto-Centro kaj la reprezentiĝo de UEA en ĉiam pli da internaciaj kunvenoj pri la lingva problemo. La informan laboron influos ankaŭ aliaj ŝanĝoj en UEA, kiuj unuavide ne havas rektan rilaton al ĉi tiu laborkampo. Ekzemple, la baldaŭa instalado de komputilo en la Centra Oficejo en Roterdamo devus liberigi niajn stabanojn de rutinaj administraj taskoj, tiel ke grava parto de ilia atento estu dediĉita al la informa laboro. Al tio povas aldoniĝi ankaŭ la Grafika Centro de UEA en Antverpeno, kiu post la translokiĝo en la novan domon, aĉetitan de la Institucio Hodler '68, komencos roli kiel ĉefa produkto de la informaj materialoj de UEA. Simile oni povas paroli pri la nun jam tre konkretaj planoj pri la starigo de Budapeŝta Esperanto-Centro de UEA. Tiurilate restas grava parto de la informa agado ĉe la fakaj asocioj kun kiuj UEA kunlaboras. Per sia budapeŝta oficejo la Asocio povos al tiuj fakaj organizaĵoj liveri konkretan helpon kaj la kunlaboraj rilatoj kun ili povos vere efektiviĝi.

Aliflanke, la Universalaj Kongresoj, kiel kulmino de la movada aktiveco ĉiujare, devus ankoraŭ pli multe malfermiĝi al la kongreslanda publiko. Tiel ili ricevos adekvatan informan rolon kaj ni almenaŭ parte eluzos la grandegan informan potencialon, kiun la Kongresoj havas. Jam la Kongresoj en Lucerno kaj precipe tiu en Stokholmo estis ekzemploj ĉi-rilate. Similajn planojn oni pretigas ankaŭ por la 66a UK en Brazilio.

Estas facile konstati, ke ni havas ambiciajn planojn jam sole sur la informa laborkampo, por eĉ ne mencii la aliajn agadterenojn de la Asocio. Gravas, ke ni ne lamentu pri la malforteco kaj manko de rimedoj. Ni estas sufiĉe multnombraj kaj ni disponas pri tiel multe da fakuloj kaj specialistoj por povi signife kontribui al la nuntempa mondo. Nia ĉefa kapitalo estas nia unika komunikilo — la Internacia Lingvo Esperanto. Kun ĝi, la internacia Esperanto-movado estas sufiĉe forta, kvante kaj kvalite, por fronti ĉian defion.

Grégoire Maertens,
prezidanto de UEA



LA ESTRARO DE UEA, LA CENTRA OFICEJO KAJ LA REDAKCIO DE LA REVUO "ESPERANTO" TRE KORE DANKAS PRO LA MULTAJ BONDEZIROJ, RICEVITAJ OKAZE DE LA JARŜANĜAJ FESTOTAGOJ, KAJ PLEJ SINCERE RECIPROKAS ILIN.

Kio okazu post Manilo?

ESPERANTO ricevis gravan agnoskon sur la kampo de turismo: la Monda Turisma Konferenco, kunvokita de Organizo Monda por Turismo (OMT), inter la 27a de septembro kaj la 10a de oktobro 1980 en Manilo (Filipinoj), akceptis deklaron, kiu eksplicite referencas al la Internacia Lingvo kaj ties rolo en la faciligo de la internacia komunikado. La Konferencon partoprenis 107 registraj delegacioj kaj la reprezentantoj de 91 interŝtataj organizaĵoj (kiel UN, Unesko ktp.).

La sukceso en Manilo estas rezulto de skriba propono al OMT fare de la hungara ministro pri komerco, Vilmos Sághy, kaj aktiva konferenca agado de Márton Lengyel (mem esperantisto kaj estro de la hungara delegacio en Manilo) kaj Gian Carlo Fighiera (iama konstanta kongresa sekretario de UEA), nun funkciano de OMT kaj vicestro de la sekretariaj servoj dum la Konferenco.

La Deklaracio de Manilo estas verŝajne la plej grava ĝisnuna turisma dokumento, kiu influos la turisman politikon de la ŝtatoj almenaŭ ĝis la fino de ĉi tiu jarcento. La teksto pri Esperanto troviĝas en la parto B de la Deklaracio, en la ĉapitro pri homaj rimedoj. Tiu teksto estas kompromisa rezulto de dusemajna batalado favore al la Internacia Lingvo. Jen la Esperanta traduko de tiu parto de la Deklaracio de Manilo, kiu koncernas nin:

(La Konferenco) rekomendas, ke estu farataj klopodoj por pligrandigi la konscion pri turismo, por tiamaniere faciligi kaj helpi la komunikadon inter la turistoj, la loĝantoj en la vizitataj lokoj kaj la turisma oficistaro; substrekas tiurilate la gravecon de la scipovo de lingvoj, precipe de tiuj kun universala destino, kiel Esperanto...

Se oni atente legas la tekston kaj ĝuste interpretas ĝin, oni estas frapita de la diplomata, laŭŝtupa maniero, kiu kondukas al la eksplicita mencio de la Internacia Lingvo, ne nur egalrange sed fakte pli emfaze ol oni aludas al la aliaj lingvoj "kun universala destino".

DUA BULTENO KAJ FLUGPROGRAMOJ

La Dua Bulteno de la 66a Universala Kongreso en Brazilio, kun detaloj pri hoteloj, ekskursoj kaj aliaj antaŭmendeblaj aranĝoj, estas nun presata en Brazilo. Ĝi estos ekspedita en februaro al ĉiuj ĝisnunaj aliĝintoj al la Kongreso. Eŭropaj kongresanoj ricevos samtempe prospektojn pri pluraj diversaj flugvojaĝoj organizataj de UEA, ekire de diversaj punktoj en Eŭropo. Legantoj, kiuj ne jam aliĝis al la Kongreso sed kiuj interesiĝas pri eventuala partopreno en tia flugkaravano, povas peti prospektojn ĉe la Centra Oficejo.

Se lerte ekspluatata, tiu rekono al Esperanto en la Deklaracio de Manilo povos transformiĝi en gravan antaŭenpuŝon de la Internacia Lingvo en la monda turismo, en oficialan aplikadon de la lingvo en la turisma praktiko kaj instruadon de Esperanto en la fakaj turismaj lernejoj.

Ĉio tio eblos nur, se la Esperanto-movado energie entreprenos la ĉi-sube sugestitajn iniciatojn kaj persistos pri ili en la venontaj jaroj.*

La landaj asocioj kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj devus kiel eble plej baldaŭ:

- 1) informi siajn lokajn societojn kaj sian tutan membraron pri la favora mencio de la Internacia Lingvo en la Deklaracio de Manilo;
- 2) kontakti laŭ la plej taŭga vojo (supozeble, unue per bone dokumentita kaj zorge ellaborita letero, poste per persona vizito) la decidajn organojn de:
 - naciaj, regionaj kaj lokaj turismaj oficejoj;
 - flugkompanioj, fervojaj administracioj kaj aliaj transportaj entreprenoj;
 - hotelaj organizaĵoj kaj unuopaj hoteloj;
 - vojaĝagentejoj, kun peto eldoni gvidlibrojn, broŝurojn, faldfoliojn kaj afiŝojn en Esperanto. Tiu propaganda materialo devus estonte aperi ne nur okaze de Esperanto-kongresoj, kiel ĝis nun, sed en daŭra ritmo;
- 3) kontakti (en la sama maniero kiel konsilite sub 2) la komunikajn kaj trafikajn aŭtoritatojn de ĉiu lando (ĉefe ministeriojn), kaj proponi la utiligon de la Internacia Lingvo en la ĉefaj indikiloj konsultataj de eksterlandanoj. Temas i.a. pri la aertrafikaj kaj fervojaj horaroj, aŭtoŝoseaj informoj, telefonaj kaj telegrafaj instrukcioj;
- 4) kontakti la direktorojn de la lernejoj por turisma personaro kaj sugesti kursojn de Esperanto.

En ĉiu tia kontakto kun la turismaj instancoj necesas forte emfazi la rekomendon, kiun pri Esperanto entenas la Deklaracio de Manilo. Kompreneble, necesas ankaŭ ne forgesi la ĝisnunan utiligon de la Internacia Lingvo en la turismo kaj aldoni taŭgajn informilojn pri Esperanto, samkiel specimenojn de la jam ekzistantaj turismaj materialoj en la Internacia Lingvo.

Por ebligi al UEA plani pliajn paŝojn sur ĉi tiu labor-kampo, precipe en la rilato al la venonta Monda Turisma Konferenco, kiu verŝajne okazos en Meksikio en

* Samtema cirkulero jam iris al ĉiuj landaj asocioj, komitatoj de UEA, Monda Turismo, TEJO kaj kelkaj aliaj instancoj kaj personoj.




Esperanto en la turismon, "por tiamaniere faciligi kaj helpi la komunikadon inter la turistoj" (Deklaracio de Manilo)

1982, necesus raporti pri la entreprenitaj paŝoj kaj eventualaj atingoj. Tiurilate bonvolu uzi la adreson de la subskribinto (vidu dorse de la kovrilpaĝo), kiun la Estraro komisiis okupiĝi pri turismo. La raportoj certe atingos nin ankaŭ se vi sendos ilin pere de la Centra Oficejo de UEA. Bonvolu sendi viajn raportojn antaŭ la 1-a de majo ĉi-jare.

Ni firme esperas, ke per komuna laboro de unuopuloj, lokaj grupoj, regionaj kaj landaj asocioj kaj de UEA mem ni povos konvene ekspluati la favoran rekomendon de Esperanto en la Deklaracio de Manilo kaj efike antaŭenigi la Internacian Lingvon en la turismo.

D-rino Flóra Szabó-Felső,
ĝenerala sekretario de UEA

(Re)aperis: *Plena analiza gramatiko de Esperanto*



*PLENA analiza gramatiko de Esperanto** denove haveblas. La 600-paĝa libro aperis, kiel anoncote, fine de la pasinta jaro kaj estis en januaro ekspedita al 280

* Vidu la bibliografiajn detalojn pri la verko sur la paĝo 13.

antaŭmendintoj. Per tio UEA kompletigis sian plej grandan eldonprojekton de post *Esperanto en perspektivo* (1974).

Se juĝi laŭ la titolo, la libro ne "denove" sed "unuafoje" haveblas, ĉar tiun saman titolon oni vane serĉus en malnovaj librolistoj. Efektive, tamen, temas pri la kvara eldono de la bone konata kaj jam longe neakirebla *Plena gramatiko*. Tiu ĉefverko de la aŭtoro duopo Kalocsay kaj Waringhien unue aperis, tiam nur 371-paĝa, en 1935 en Budapeŝto. Dua eldono, ampleksigita, sekvis jam en 1938, sed granda parto de ĝia eldonkvanto detruigis pro la milito. De la tria eldono (Milano, 1958-64) aperis nur du kajeroj, riĉaj je preseraroj, sed de la tria kajero — tiu kun la nemalhaveblaj indeksoj! — restis nur presprovaĵoj. Praktike, do, jam kvardek jarojn la uzantoj de Esperanto malhavis tian ampleksan gvidlibron pri la lingvouzo.

La nova eldono estas ne nur ampleksigita sed ankaŭ detale reviziita, kaj la 70-paĝaj indekso kaj enhavtabelo faciligas la retrovon de ĉiu ajn temo. Tio estas aparte necesa helpilo ĉe tia ege detala, eĉ labirinta verko.

Kompostita en Brazilo, enpaĝigita kaj fotografita en Nederlando kaj Belgio, fine presita kaj bindita en Ĉinio, "PAG" (kiel ĝi familiare jam nomiĝas) estas krome atesto pri la kreskanta universaleco, al kiu strebas UEA kaj la tuta movado.

Baldaŭ la kvara oficejo

ESTRARKUNSIDOJ estas okazoj por inventari la havaĵon, la agadon kaj eĉ la membraron de la Movado ĝenerale, kaj precipe de UEA mem. Tial la lasta kunsido de la Estraro de UEA, inter la 19a kaj 21a de decembro 1980 en la Centra Oficejo en Roterdamo, traktis tagordon de pli ol 150 punktoj, dum proksimume 30 kunsidohoroj. Tia inventaro, tia ĝenerala trakribro de ĉiuj aspektoj de la asocia vivo, fariĝas necesa pro la fakto, ke la Estraro efike kunsidas nur dufoje jare, dum tiun trian kunsidon dum la UK forrabas la kongresaj aktualaĵoj. La buĝeto por 1981 antaŭvidas nur unu eksterkongresan kunsidon kaj ĝi certe havas ŝancojn rekordi rilate la amplekson de sia tagordo.

Tio ĉi estis la unua postkongresa kunsido de la Estraro elektita dum la 65a UK en Stokholmo. Ĉeestis ĉiuj ok estraranoj, pluraj oficistoj de UEA kaj reprezentanto de la junulara sekcio TEJO. Kvankam duono de la Estraro novelektiĝis en Stokholmo, oni ne havis la impreson, ke la Estraro kiel kolektivo estas nova. Tio sendube rezultas el la fakto, ke la rolo de la Komitato de UEA esence ŝanĝiĝis dum la lastaj jaroj, tiel ke la kvar novaj estraranoj jam antaŭe tre aktive sekvis la agadon de la Asocio tra la komitataj kaj aliaj komisionoj. Vi scias, ke UEA ne plu havas nur unu oficejon kiel dum jardekoj. Tiurilata ekspansio multe okupis la antaŭan Estraron kaj rezultigis la ekfunkcion de la Grafika Centro en Antverpeno kaj la Nov-Jorka Oficejo de UEA. Jam de kelkaj jaroj oni faras preparojn por malfermi la kvaran oficejon. En la decembra kunsido definitive tiurilataj planoj kaj la Estraro aprobis kontrakton inter Hungara Esperanto-Asocio kaj UEA pri la starigo de Budapeŝta Esperanto-Centro. Verŝajne nur post kelkaj monatoj ekfunkcios tiu nova oficejo de UEA kaj okupiĝos precipe pri la faka agado kaj scienc-teknika eldonado. Aliflanke, la Estraro decidis, ke la Grafika Centro translokiĝu al la nove aĉetita domo de Institucio Hodler '68 en Antverpeno. Aprobata estas ankaŭ la investo por la aĉeto de la komputilo por la Centra Oficejo en Roterdamo; oni atendas ĝian liveron jam en februaro ĉi-jare. La aŭtomatigo de UEA postulos ankaŭ kelkajn fizikajn rearanĝojn kaj rekonstruojn de la roterdama domo, pri kio la Estraro detale okupiĝos verŝajne en sia venonta kunsido.

Multan tempon postulis la kompletigoj en la konsisto de la diversaj komisionoj, neceso nomi aŭ renomi multnombrajn komisiitojn, reprezentantojn, redaktorojn ktp. Kiel kutime, vi legos tiujn listojn en la ĉi-jara eldono de la Jarlibro. La Estrara Raporto ankaŭ ĉi-jare aperos en nia revuo (verŝajne en la maja numero) kaj unuafoje en la lastaj jardekoj traktos la periodon ĝis jarfino, tiel ke en la venontaj jaroj tiuj raportoj traktu

la difinitan kalendaran jaron, same kiel jam delonge okazas pri la financaj superrigardoj de la Asocio.

Dum la lastaj jaroj financoj de la Asocio ne plu estas ekscita ero en la kunsidaj tagordoj. Tio neniel signifas, ke UEA ne havas financajn problemojn. Male estas. Tamen, pro ekstreme atenta sekvado de la financaj evoluoj kaj pro same tia mastrumado de la asociaj rimedoj, la Estraro ne plu surpriziĝas pri la kontostatoj kaj neatenditaj rezultoj. Lastatempe la Asocio enkasigis kelkajn gravajn heredaĵojn kaj donacojn, pri kio ni parte jam skribis (vidu ankaŭ en ĉi tiu numero la donacoliston sur la paĝo 17). El anonima donaco de 20 000 guldenoj la Estraro decidis krei novan Fondaĵon Scienco kaj Tekniko kaj meti en tiun konton duonon de la menciita sumo. En sia venonta kunsido la Estraro traktos la financajn rezultojn de 1980 kaj ni tiam pli detale traktos la temon.

Ĉiuj asociaj periodaĵoj estis en la tagordo. Kvankam la Buĝeto por 1981 antaŭvidas nur 10 numerojn de ĉi tiu revuo, la Estraro esperas aldoni al tio plian numeron, kiu estos dediĉita al la novaj esperantistoj kaj redaktita de aparta gastredaktoro. Temas ĉi tie, unuflanke, pri la konstato de la Estraro, ke nia revuo en sia nuna formo maltrafas konsiderindan parton de la movadaĵoj, kiuj nek lingve nek movade havas la necesan scio-

La ĝenerala sekretario ambaŭmane argumentas, dum la prezidanto pacience atendas: Flóra Szabó-Felső kaj Grégoire Maertens



Eĉ tre viglaj diskutoj finiĝas per unuanima interkonsento: Maertens, Corsetti, Tonkin kaj E. Kehlet voĉdonas.



Papermontoj sur la tablo por cent kvindek eroj en la tagordo (de maldekstre): R. Corsetti, H. Tonkin, P. Peeraerts (direktoro de la Grafika Centro en Antverpeno), B. Ragnarsson, U. Grattapaglia kaj P. Todorov

nivelon por legi ĉi tiun revuon. Aliflanke, la redaktoro insistas, ke la nuna amplekso de la revuo ne permesas apartan atenton al la novuloj kaj komencantoj, kies interesojn kaj bezonojn devus unuavice atenti la naciaj Esperanto-periodaĵoj. Krome, ĉi tiu revuo havas sian 75-jaran tradicion kaj konsiderindan renomon, kiujn estas multe pli facile malkonstrui ol teni kaj plifirmigi. Tial la eksperimento kun la speciala numero por la novuloj servos kiel ĝenerala sondo pri eblecoj, ke UEA estonte regule eldonu apartan periodaĵon por la novaj esperantistoj.

Post la apero de *Plena analiza gramatiko de Esperanto* (vidu aliloke en ĉi tiu numero), baldaŭ sekvos kelkaj novaj libroeldonoj de UEA. Jam kompostataj estas legolibro de Marjorie Boulton kaj lernolibro de Antonín Slanina (v. la paĝon 18). La Grafika Centro en Antverpeno nun prilaboras kolekton de prilingvaj artikoloj de A.D. Atanasov. Ĉiuj tri libroj devus aperi ĉi-jare. Krome, la Estraro faris principan decidon pri la eldono de la verko *Vetero kaj klimato de la mondo* de D. Riley kaj L. Spolton, kiun el la angla tradukis K. Long. Tiu verko verŝajne troviĝos inter la unuaj volumoj pri kiuj okupiĝos la Budapeŝta Esperanto-Centro de UEA. La kunsido traktis ankaŭ kelkajn aliajn eldonprojektojn kaj proponojn.

Turismo, informado, eksteraj rilatoj kaj kongresoj okupis verŝajne trionon de la kunsida tempo. Al la unuaj du temoj ni dediĉas apartan spacon en ĉi tiu numero. Pri la eksteraj rilatoj la Estraro aŭdis detalan raporton de d-ro Tonkin, kun emfazo pri la funkciado de la Nov-Jorka Oficejo, kiu ĉefe agas sur tiu labor-kampo. Interalie, estas farita decido subteni la restadon de Tibor Sekelj en marto kaj aprilo ĉi-jare en Parizo, por sondi inter la registaraj reprezentantoj ĉe Unesko, lige al la venonta Ĝenerala Konferenco de tiu organizaĵo en 1983 kaj eventuala nova elpaŝo pri Esperanto antaŭ Unesko.

Verŝajne montriĝos, ke la 65a UK en Stokholmo donis ankaŭ finance kontentigajn rezultojn. La preparoj por la 66a UK en Brazilio evoluas bone, kaj simile okazas

kun la 67a UK en Antverpeno en 1982. Por la posta jaro, 1983, la Estraro ankoraŭ ne havas taŭgan inviton. Ankaŭ ĉe la Kongresoj, same kiel sur pluraj aliaj agad-kampoj, montriĝas neceso ellabori novan regularon, i.a. por ligi ĝin al la nova Statuto de UEA. La Estraro provos baldaŭ ellabori kaj pridiskuti ĝeneralan idearon pri la Universalaj Kongresoj, kiu poste servu kiel bazo de nova kongresa regularo.

Plurajn gravajn demandojn tuŝis la kunsida parto, kiu okupiĝis pri kulturo. La Estraro provos, unuflanke, pli precize difini la kulturan politikon de la Asocio kaj, aliflanke, instigi la landajn asociojn, ke ankaŭ ili kreu kulturajn fakojn kaj delegu siajn reprezentantojn al la centra kultura forumo en UEA. Ankaŭ ĉi tie estis traktitaj kelkaj eldonprojektoj kaj la funkciado de la Belartaj Konkursoj. Ni menciis la decidon, ke la granda poezia volumo de tradukaĵoj *Tutmonda sonoro* de K. Kalocsay eniru la Serion Oriento-Okcidento; la libron eldonos Hungara Esperanto-Asocio.

Virina, faka kaj landa agadoj ankaŭ estis en la tagordo. Nun okazas traktado pri aliĝo de plia landa asocio kaj kontraktoj pri kunlaboro kun pliaj fakaj organizaĵoj. Ni ne elĉerpis la liston de la kunsidaj temoj, ĉar tio ne eblas en ĉi tiu spaco. Ne gravas. La Estraro decidis denove kunsidi inter la 13a kaj 15a de marto 1981 kaj ni do baldaŭ denove devos reinventari la asocian agadon.

Bona kunlabora etoso estas la ĉefa trajto kiu karakterizas ĉi tiun novan Estraron de UEA. Fakte, se decas esprimiĝi tiel, preskaŭ ĝena montriĝas la estrara unanimeco pri la plimulto de la demandoj. Kiam oni kunsidas dum tridek horoj, bonvenus iom da dramaj elementoj. Io simila, komedia, okupis parte la Estraron en decembro, kvankam ĉefe en la eksterkunsidaj horoj: du delegitoj insultis unu la alian en sia nacia lingvo sed poste pliriĉigis ankaŭ Esperantan fakan vortaron en tiu sfero kaj, fine, petis la Estraron arbitracii. La Estraro bele amuziĝis kaj verdiktis, ke temas pri privata korespondado inter tiuj du personoj.

S.M.

Ne ekzistas sciencaj majstroverkoj

MI LEGIS kun streĉa intereso la mirindan informon de s-ino Saheb-Zamani pri novaj iniciatoj en Irano (*Esperanto*, okt. 1980, p. 161). La edzo kaj ŝi faras nekalkuleble grandegan laboron kaj ricevas niajn aplaŭdojn. Ili meritas respondon al sia ripetita petego por malbanaligo kaj senluksigo de la Esperanto-movado en evoluantaj landoj, precipe pri malplia emfazo de beletro kaj abundigo de sciencaj kaj teknikaj verkoj kiuj kontentigus la krizajn bezonojn de la Tria Mondo. Tre bedaŭrinde, tiu nova direkto tute ne eblas, kaj la neeblo kaŭzis la mankon de reeĥo al la peto.

Eĉ se la teorio de "majstroverkoj" estas kritikebla en la belliteratura mondo, tamen ja ekzistas iuj gravaj ĝenerale rekonataj beletraĵoj, kaj tradukado de ili en Esperanton kun provo verki originalaĵojn povas eĉ en malgranda kvanto bone influi la eksteran klerularon. Sed tute ne ekzistas utilaj "majstroverkoj" en scienco kaj tekniko, do etkvanta tradukado kaj verkado tute ne povas funde efiki. Jes, gravas ke ni kultivu la grun-

don (Someraj Universitataj Kursoj, budapeŝtaj *Sciencaj komunikaĵoj*, ktp.) por elprovi la lingvon, sed niaj iranaj kolegoj prave plendas, ke tio ne povas kontentigi la soifon de la Tria Mondo. La problemo estas tute kvanta. Ni ne koleru, ke oni "malŝpare" eldonas inter 50 kaj 100 nesciencajn librojn ĉiujare kaj nur unu-du sciencajn. Tiuj verkistoj, kiuj produktas la nesciencaĵojn, ne mem kapablas science verki. Sciencistoj kaj teknikistoj malmultnombros en ĉiuj socioj, kaj ankaŭ en Esperantujo. Do ni ne povas atendi nun amasan publikigon pri scienco kaj tekniko en Esperanto, kaj ne estas motivo por voli silentigi la beletristojn.

Kio estas la solvo? Ni devas politike venkigi Esperanton en diversaj rondoj, inkluzive sciencajn. Tiu venkigo estos sekvata de amasa uzo de Esperanto en scienca komunikado, kiu helpas la Trian Mondon. Tia amasa uzo, kiu laŭ la naturo de scienco nepras por vera utilo, ne povas antaŭi politikan akcepton. Kontraste, etkvanta beletrado povas antaŭi utile, kaj beletro en Esperanto ege helpas en konvinko eĉ de sciencistoj kaj teknikistoj, ĉar ili komprenas, ke lingvo bele tre kapabla povos servi en scienco, ankaŭ pro tio, ke ekzistas etkvantaj elprovoj en scienco, adekvataj por montri taŭgecon sed ne por sensoifigi irananojn.

Pardonu nin, gekolegoj Saheb-Zamani! Vi petas tion, kion ni tute ne povas fari. Ni investu niajn fortojn en politikaj premoj — ni estas tro malmultnombraj por kontentige eldoni science.

Bruce Arne Sherwood

INICIATOJ:

Malto en Jugoslavio

LA MALGRANDA mediteranea ŝtato Malto gastis per Esperanto dum ses vesperoj, inter la 8a kaj la 13a de decembro, en la jugoslavaj urboj Zagreb, Osijek kaj Vinkovci, en la kadro de "Maltaj Kulturaj Tagoj". La aranĝon kunorganizis Kroatia Esperanto-Ligo kaj la profesia entrepreno Internacia Kultura Servo. Subtenis ĝin regionaj socipolitikaj instancoj, kiuj kun intereso sekvas la klopodojn de esperantistoj prezenti kulturojn de malpli konataj popoloj. La kulturon de Malto al jugoslavo peris membroj de Malta Esperanto-Societo, s-roj Karmel Mallia kaj Oskar Mifsud. Dum apartaj vesperoj estis prezentitaj maltaj historio, muziko, literaturo kaj filmoj.

La prezidanto de Malto, d-ro Anton Buttigieg, sendis okaze de la aranĝo, per video-kaseto, sian personan mesaĝon al jugoslavo. D-ro Buttigieg per sia lirika salutparolado (li estas ankaŭ konata malta poeto) viciĝis inter tiuj ŝtatestroj, kiuj en la Internacia Lingvo vidas taŭgan komunikilon por la egalrajtigo de la popoloj: "Helpe de Esperanto, kiu estas nenies — sed do ĉies — propraĵo, ni proksimiĝas unuj al la aliaj, ni fariĝas egalaj."

Dum sia restado en Jugoslavio Karmel Mallia ricevis la inviton kontribui al "Moderna malta poezio", libro, kiun preparas jugoslava eldonejo.

Per senpaga transporto de maltaj gastoj kaj ekspozici-materialoj helpis la jugoslava flugkompanio JAT.

Amaskomunikiloj montris nekutime grandan intereson por la aranĝo. Krom raportoj en televido kaj ĵurnaloj aparte elstaris Radio Zagreb, kiu al la temoj Malto kaj Esperanto dediĉis entute 4 elsendohorojn.

Esperanto rolis dum ĉiuj prelegoj, intervjuoj kaj diskutoj kiel la ĉefa komunikilo, kaj denove montriĝis, ke ĝi plenumas la pontolingvan rolon en la plej trafa kaj prestiĝa maniero.

Maltanoj volonte ripetis la aranĝon alilande. Imitinde, se la necesaj fortoj kaj intereso ekzistas (Carmel Mallia, 89 Sanctuary St., Zabbar, Malto).

Spomenka Štimec

REDAKCIA NOTO: Ni enkondukis ĉi tiun raporteton per la titolo "Iniciatoj". En Zagrebo tio ne plu estas iniciato sed praktiko, ĉar la "Maltaj Kulturaj Tagoj" estis jam la tria aranĝo tiaspeca: Etiopio (1977), Katalunio (1978). En aprilo ĉi-jare okazos "Tagoj de Kroatia Kulturo en Katalunio" en Sabadell (Hispanio), kaj por la fino de 1981 en Zagrebo oni planas la aranĝon de "Tagoj de Madagaskaro". La titolo "Iniciatoj" celas do la aliajn, ne la zagrebajn aktivulojn.

Forge ne plu vivas

EN BERLINO (okcidenta), la 16an de decembro 1980, forpasis Jean Forge, unu el la plej konataj romanistoj de la originala literaturo en Esperanto. La romanoj de Forge (kaj tiuj de Baghy) kreis la necesan evoluponton inter la unuaj verkoj en tiu ĝenro kaj la postaj, pli gravaj prozaj volumoj, en la dua duono de nia jarcento. Kvankam la tri romanoj de Forge aperis antaŭ plenaj kvindek jaroj, li seninterrompe ĉeestis kaj ankoraŭ ĉeestas en la movada kultura vivo, i.a. dank' al la fakto, ke ĉiuj liaj verkoj reeldoniĝis dum la lasta jardeko. Jean Forge estis en la Movado ĉiam pli konata laŭ sia pseŭdonimo ol laŭ sia vera nomo — Jan Fethke. Forge naskiĝis la 26an de februaro 1903 en Opole (Pollando). Lia unua romano, *La pajloŝtopita papago*, aperis, en la germana, jam en 1920. Kiel politeknika studento li komencis labori ĉe ĵurnalo en Gdańsk. Poste, en Berlino, li fariĝis reĝisoro asistanto ĉe la fama filmproduktejo UFA, kaj redaktoro de fakrevuoj en Parizo, Varsovio kaj Berlino. En 1928 komencis aperi liaj filmoj, inter kiuj plej grandan sukceson rikoltis la siatempe avangardaj "Transe de la strato" (ĝia scenaro aperas en *Mia verda brevierio*) kaj "Vojaĝo de

Panjo Krause en feliĉon". Forge verkis entute pli ol kvindek filmscenarojn por la germana, franca kaj pola filmindustrioj, kaj reĝisoris 12 filmojn. Dum la dua mondmilito li laboris kiel filmisto en Prago kaj Munkeno. Poste, li verkis kaj reĝisoris multajn filmojn en Pollando.

En 1919 Forge renkontis Esperanton kaj entuziasme aliĝis al ĝi, kune kun la fratoj Edmund kaj Stefan. Fine de la gimnaziaj studoj li eĉ trovis la vojon al Horrem (Germanio), kie li en 1922 kaj 1923 laboris en la redakcio de la semajna *Esperanto triumfonta* (hodiaŭ *Heroldo de Esperanto*).

La fratoj Fethke tre aktive partoprenis la polan Esperanto-movadon. En 1931 ili varbis la niĝerianon Kola Ajayi kaj organizis por li prelegvojaĝon tra pluraj landoj; Forge poste rakontis pri tio sub la titolo "Nia nigra filo" (en *La verda raketo*). En 1932 Forge gvidis Ĉe-metodajn kursojn en Svedio, Germanio, Ĉeĥoslovakio kaj Pollando.




La famo de Jean Forge ŝuldiĝas ĉefe al liaj tri originalaj romanoj, aperintaj intermilite. *Abismoj* (1923) estas amrakonto, kies formo — ĉiu rolulo parolas pri si mem — superas la malpli originalan enhavon. En la farsa *Saltego trans jarmiloj* (1924), diversaj modernuloj uzas tempovojaĝan aparaton por viziti la antikvan Romian Imperion. Plej sukcesa estis *Mr. Tot aĉetas mil okulojn* (1931), kies temo — la lezado de privateco per kaŝitaj televidaj registriroj en granda hotelo — ankoraŭ ne perdis sian aktualecon. Ĝi inspiris la filmon "La mil okuloj de d-ro Mabuse" (1960) de la mondfama germana reĝisoro Fritz Lang.

Sub direktado de Forge estis dublita la origine germanlingva filmo "Morgaŭ ni komencos la vivon", prezentita en la 26a UK (Stokholmo, 1934) kiel la unua plenlonga sonfilmo en Esperanto.

De post la dua mondmilito bedaŭrinde ne plu venis romanoj el la plumo de Forge, sed novelojn kaj kelkajn aŭtobiografiajn artikolojn li kolektis en du volumoj: *La verda raketo* (1961) kaj *Mia verda brevierio* (1974). La leĝere humuraj noveloj traktas, iom fantazie, diversajn aspektojn de la esperantista vivo. En 1973 kaj 1974, ĉiuj tri romanoj kaj du novelaroj aperis kiel serio ĉe Fondumo Esperanto (Helsinki).

Aliaj postmilitaj agadoj de Forge inkluzivis la kreon de filmo pri la jubilea 44a UK (Varsovio, 1959), "Verda stelo super Varsovio", laŭ komisiono de la pola ministerio pri kulturo, kaj verkado (kun la frato Edmund) de la pola lernolibro *Mil vortoj de la lingvo Esperanto* (1963, eldonkvanto 46 000 ekz.).

La verkoj de Forge ne montras grandan strebon kompreni aŭ solvi profundajn problemojn de la homo kaj ties mondo. Ilia ĉefa celo ŝajnas esti simple: distri. Kaj tio ne estas malgravaĵo en nia kulturo, kiu disponas tiel malmultajn rimedojn por rekompenci kapablajn metiistojn de la beletro. Ankoraŭ mankas kompetenta studo pri la kontribuo de Jean Forge al la kulturo de la Internacia Lingvo kaj pri la signifo de lia impona verko.



La romanisto kaj nia heredaĵo: Jean Forge kun sia verkaro

Esencaj kongrespreparoj

KIAM nia vojaĝo al la kongresa lando okazas sen problemoj, kiam la kongresa urbo estas plaĉa, kiam nia hotelo estas komforta, — ni kontentas. Se la kongresa balo estas gaja, se la bankedo riĉas, se la ekskursoj bone pasas, — ni nomas ĉion ĉi bona kongreso. Ne tre gravas la kongresa programo, krom se ĝi estas amuza. Se fine ankaŭ niaj koloraj lumbildoj sukcesas, ni proklamas ĉion ĉi modela kongreso kaj dum jardekoj nostalgie parolas pri ĝi. Ankaŭ la kongresorganizantoj montras ĉiam pli grandan atenton al la ĉi-supraj postuloj de la kongresa publiko. Ĉu ni ne erarvojas iom?

En Brazilo oni jam tute febre diskutas la bankedajn menuon kaj floraranĝon, la ekskursojn urbajn, tuttagajn kaj postkongresajn. Brazilio ne malatentos viajn postulojn de turisma kliento. Sed, ĉu ĉio ĉi sufiĉas, ĉu pro tia turisma sukceso ni okazigas la Universalajn Kongresojn? Vi certe konsentas, ke tio ne estas la esenco de nia ĉi-jara vojaĝo al la suda hemisfero. Kio do estas la esenco kaj, ĉu iu pensas pri ĝi?


La 15an de decembro 1980, eble ne hazarde ĝuste je la Zamenhofa Tago, la plej prestiĝa eduka radio-stacio de Brazilo, Rádio Cultura (San-Paŭlo), elsendis la unuan lecionon de la nova Esperanto-kurso de prof. Sylla Chaves, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo. Temas pri 20-leciona kurso, speciale verkita por radio kaj memstara lernado helpe de sonbendoj. La radio-stacio elsendos la kurson dum kvar monatoj, ĉiulunde je la 14h30 kaj 22h15 laŭ la loka tempo. Nun ankoraŭ daŭras la traktado kun unu el la ĉefaj televidaj kom-

panioj de Brazilo, ke ankaŭ ĝi elsendu Esperanto-kurson, kiu devus komenciĝi en marto ĉi-jare. Estas tre probable, ke aliaj edukaj radio-stacioj de Brazilo transprenos la Esperantan kurson de San-Paŭlo.

Ni ne volas ĉi tie eniri la detalojn de la nova metodo, kiun Sylla Chaves titolis "Aŭdu kaj lernu". Ni lasu tiujn detalojn al recenzo, iam poste en ĉi tiu revuo. Ni diru nur, ke la metodo nun baziĝas je du libroj kaj du gramofondiskoj (ĉio havebla ankaŭ en formo de sonkasetoj). Kio aparte gravas: la metodo uzas en la elementa kurso 500 radikojn, kaj en la daŭriga kurso 500 pliajn. Entute do nur mil radikoj, ĉiuj el la Baza Radikaro Oficiala de la Akademio, elektitaj laŭ la ofteco. En la sonregistrado de la kurso partoprenis dek legantoj aŭ aktoroj en la dialogoj kaj kvin kantis-toj. Kiel kuneldonanto de la metodo, apud Brazila Esperanto-Ligo, aperas Fondaĵo Getúlio Vargas, scienca institucio kun grandega prestiĝo en la lando. Ĝuste en la librejo de tiu Fondaĵo la 15an de decembro okazis la oficiala lanĉo de la metodo "Aŭdu kaj lernu".

Kiel ĉio ĉi rilatas al la preparlaboroj por la 66a Universala Kongreso en Brazilio? Nu, tiu rilato estas multflanka kaj esenca. Se niaj kongresoj ankoraŭ kapablas vekti publikan intereson pri la Internacia Lingvo, ni devas anticipi pretiĝi por respondi al tiu interesiĝo. Ni devus komenci mezuri la sukceson de la Universalaj Kongresoj, ne per la glateco kaj komforto de la turismaj aranĝoj ligitaj al ili, sed per la nombro de la homoj, kiuj informiĝis pri Esperanto kaj komencis lerni ĝin pro la koncerna Kongreso. Ni foje rezignu pri la kongresa bankedo kaj donacu tiun monon por anticipi eldoni lernolibron en la svahila lingvo antaŭ ol kongresi en Kenjo. Ni foje organizu finance kaj turisme malsukcesan kongreson en lando kie pro tiu "malsukceso" ekfloros la movado por la Internacia Lingvo.

sm



Preta instrumaterialo por respondi al la intereso, kiun vekas la unua Universala Kongreso en Sud-Ameriko: La aŭtoro kaj liaj kunlaborantoj okaze de la festa lanĉo de la metodo "Aŭdu kaj lernu" en la Fondaĵo Getúlio Vargas en Rio de Janeiro

Lingvosciencistoj ja interesiĝas pri Esperanto

EN SIA ARTIKOLO "Kial Esperanto ne interesas lingvosciencistojn?" (*Esperanto* 2/1980), la juna hinda lingvisto kaj esperantisto d-ro Probal Daŝgupto asertas, kiel jam montras la titolo de lia artikolo, ke lingvosciencistoj ignoras Esperanton. Li listigas kelkajn nekonvinkajn kaŭzojn, entute nur rigardas la okcidentmondan lingvistaron kaj pruvas fakte nenion. En mia repliko, kiun publikigis la revuo *Esperanto* en n-ro 4/1980, mi i.a. skribis: "Daŝgupto neniel pruvis, ke 'Esperanto ne interesas lingvosciencistojn', sed tion simple kaj tre kuraĝe **asertas**. Daŝgupto evidente eliras de sia scio (aŭ impresoj) pri la okcidenta lingvoscienco kaj tio estas tre unuflanka prezento. Almenaŭ mi mem en Germana Demokratia Respubliko tute ne spertis, ke la lingvistojn 'Esperanto simple ne interesas'. Mi povus longe argumenti la kontraŭon, kaj tion povas ankaŭ la profesoroj Szerdahelyi, Isajev, Bociort kaj aliaj. Kompreneble, dependas, kiel kaj **sub kiuj vidpunktoj** oni prezentas Esperanton al la lingvistoj. . ."

Nu — la titolo anoncita interlingvistika seminario masive fundamentas la ĝustecon de mia repliko al Daŝgupto. Bedaŭrinde oni entute ne daŭrigis la diskuton pri la temo en la revuo de UEA.

Kio do okazis en Ahrenshoop? La Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio ĉe Centra Laborrondo Esperanto (CLE) jam en 1979 invitis **profesiajn** lingvistojn (neesperantistajn!) de universitatoj kaj altlernejoj de GDR, de la Akademio kaj aliaj instancoj, kaj prezentis al ili dum 4-taga seminario superrigardajn prelegojn pri problemoj de interlingvistiko kaj esperantologio. La sukceso estis grandega. Ni detale raportis pri tio en *Der esperantist* 3/79 (n-ro 95). Krome, kiel kutime ĉe gravaj sciencaj atingoj, ankaŭ *Budapeŝta informilo* donis riĉan lokon por raporto (en n-ro 6/79). Interese, ke la redaktoro de la UEA-revuo *Esperanto* ne opiniis grava la temon kaj presis eĉ ne unu frazon pri la seminario. En GDR publikigis raporton la prestiĝa *Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung* (Revuo por fonetiko, lingvistiko kaj komunikada esploro) 4/1980 kaj la scienca revuo de la Universitato Halle 2/1980. Pri la problemoj de la sciencaj seminarioj oni ankaŭ komparu mian enkondukon en la antologio *La internacia lingvo: sciencaj aspektoj* (Berlin, 1979).

Sed finfine pri la dua interlingvistika seminario mem: Ĝi estis je unu tago pli longa ol tiu en 1979 kaj okazis de la 18a ĝis 22a de novembro 1980. Ankaŭ la

preparoj malsamis al tiuj por la unua. Se en 1979 ni sendis invitleteron kaj 4-paĝan tezon "Pri la signifo de interlingvistikaj esploroj" al ĉiuj lingvosciencaj kaj fremdlingvaj sekcioj de ĉiuj altlernejoj de GDR, ni ĉi-foje dissendis la materialon (inkluzive de la prilaboritaj tezoj) al 90 elektitaj lingvosciencistoj de GDR. Necesas mencio, ke Kulturligo akiris la specialan permeson de Humboldt-Universitato, ke kiel kuninvitado funkciu ankaŭ la konata lingvosciencisto prof. d-ro Georg F. Meier. Prof. Meier estas tre altreputacia lingvisto, estro de la katedro pri komunikada scienco, ĉefredaktoro de la supre menciita *Zeitschrift*. . . kaj estas konata al absolute ĉiu lingvisto en GDR (kp. ankaŭ *Der esperantist* 4/1980, p. 78 kaj 5/1980, p. 109). Pro tio la invitmaterialo jam havus certan efikon, eĉ se invititoj tute ne reagus.

De la 90 invititoj ĉirkaŭ 10 reagis tre afable kaj interese, sed motivigis sian neĉeeston per oficaĵoj aŭ personaj kaŭzoj. Subtrahante la membrojn de la Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio do ĉi-foje partoprenis entute 16 lingvistoj, el ili 12 kiel novuloj, la seminarion. Se en 1979 ĉeestis nur du universitataj profesoroj, ĉi-jare venis kvar. El la 23 partoprenintoj entute 17 estas doktoroj, inter ili d-ro Spitz el Ĉeĥoslovakio.

Speciale grava estis la partopreno de la konata lingvisto prof. d-ro Wilhelm Schmidt el Potsdam, nacipremiito, membro de la Prezidio de la Scienca Konsilantaro por Lingvoscienco ĉe la Akademio kaj membro de la Akademio de Pedagogiaj Sciencoj. Prof. Schmidt havas fundamentajn meritojn en la konstruo de marksisma lingvosciencia teorio kaj de la germanistiko en GDR. Multaj elstaraj verkoj venas el lia plumo. Tre elokvente prof. Schmidt pledis dum la seminario por serioza instituciigo de interlingvistikaj-esperantologiaj esploradoj kaj instruado.

La seminarion ankaŭ distingis pli ampleksa temaro. Lastjare estis entute 12 prelegoj de 9 diversaj prelegantoj. Ĉi-foje oni aŭskultis 18 prelegojn de 12 diversaj prelegantoj. Jen la listo (laŭ la sekvo de la prezento):

- "La internacia lingvo-situacio en la lumo de la planlingva demando" (prof. d-ro Georg F. Meier, Humboldt-Universitato, Berlin),
- "Pri la problemaro de la mondlingvoj en la 20a jarcento" (prof. d-ro Frank Häusler, Pedagogia Altlernejo, Magdeburg),
- "Pri la rolo de la angla lingvo en la internacia komunikado, sub speciala konsidero de la scienc-

teknika revolucio" (asistanto Harald Hecker, Karl-Marx-Universitato, Leipzig),

- "Postuloj pri kono de fremdaj lingvoj al inĝenie-roj en socialisma entrepreno kaj en altlernejoj" (d-rino Heidrun Krug, Teknika Altlernejo, Leipzig),
- "Pri la problemaro de 'facilaj' kaj 'malfacilaj' lingvoj" (Wolf-Dietrich Wendt, altlerneja instruisto ĉe Humboldt-Universitato, Berlin),
- "Scienca valoro de planlingvoj, kun aparta konsi-dero de Esperanto" (d-ro Detlev Blanke, Kulturligo),
- "Rimarkoj pri lingvaj ordigo-sistemoj" (doc. d-ro Otto Troebes, Martin-Luther-Universitato, Halle),
- "Bahasa Indonesia — nacia planlingvo, Esperanto — internacia planlingvo" (d-ro Erich-Dieter Krause, Karl-Marx-Universitato, Leipzig),
- "Esperanto — aglutina planlingvo" (d-ro Erich Spitz, Ĉeĥoslovakio),
- "Pri la strukturo kaj evoluo de Esperanto" (d-ro Detlev Blanke),
- "Planlingvoj — akustike" (d-ro Detlev Blanke),
- "Esperanto — objekto kaj instrumento de kom-putiloj" (d-ro Paul String, VEB Robotron, Dresden),
- "Esperanto kaj datum-prilaborado" (d-ro Martin Schüler, Centra Instituto por matematiko kaj meka-niko de la Akademio),
- "Esperanto — kiel literatura lingvo" (d-ro Till Dahlenburg, fakinstruista konsilanto, Brühl),
- "Esperanto kiel objekto de instruado: internaciaj spertoj, eksperimentoj kaj problemoj" (d-ro Till Dahlenburg),
- "Interlingvistiko en akademioj kaj altlernejoj — internacia situacio" (d-ro Detlev Blanke),
- "Problemoj de la instituciigo de la interlingvistiko kaj esperantologio en GDR" (prof. d-ro Georg F. Meier).

Krome: "Internacia planlingva komunikado — praktikaj impresoj", kun diapozitivoj (d-ro Detlev Blanke). Valoras mencii ankaŭ, ke dum la seminaria tempo estis ekspoziciitaj pli ol 100 fakverkoj pri la unuopaj temoj el la privata biblioteko de D. Blanke. Eĉ komence skeptikaj partoprenantoj ĉe la fino de la seminario verve engaĝis sin por la traktado de interlin-gvistikaj problemoj kaj por Esperanto. Oni tre kon-krete diskutis pri la estonteco de Esperanto en altlernejoj kaj universitatoj.

Kompreneble la gvidantaro de la seminario zorgis, ke eĉ ne la vualo de propagando poresperanta povu ekesti. Tio certigis la seriozan kaj sobran, sekve aktivan kaj kreivan sciencan laboratmosferon. Neniu sentis sin primisiuita por la "venko" kaj ĉiu mem, senaltrude, povis tiri siajn konkludojn, kompreneble favore al Esperanto.

Tiun spertoriĉan kaj rezultoplenan seminarion sekvis diversaj kolokvoj, prelegoj kaj diskutoj en diversaj altlernejoj kaj universitatoj de GDR pri apartaj temoj. La rezultojn oni prezentos en la kadro de la 3a inter-lingvistika seminario fine de 1981, denove en Ahrens-hoop (loko ĉe Balta Maro), kiu jam fariĝis nocio.

D-ro Detlev Blanke

REDAKCIA NOTO: Se estus ĝusta la riproĉo de d-ro Blanke, ke "la redaktoro de . . . *Esperanto* ne opiniis grava la temon" ankaŭ ĉi tiu teksto ne aperus. Temas pri io alia: Ni ne aperigas raportojn, kiuj neniam atingas nin; ni tre malvolonte publikigas tekstojn pri eventoj okazintaj antaŭ duona jaro, en kio ni tre mal-similas al *Der esperantist*. Nun okazis io alia, ĉar ĉi tiu raporto pri la seminario, okazinta fine de novembro 1980, atingis nin fine de decembro en la sama jaro. Faru simile ankaŭ estonte, ni petas!

"KASTOROJ" KAJ "GEONKLOJ":

Kiuj instruas la infanojn?

KIEL FONDINTO kaj administranto de Geonkloj Esperantistaj kaj de la Kastora Klubo de Esperanto, mi ofte pensas pri tiu demando. Jes, mi scias, ke miaj spertoj kun du organizaĵoj ne nepre indikas ĝeneralan situacion, sed ĉar ambaŭ proponas senpagan servon al la infanoj de nia Movado, helpante la instruistojn teni ilian intereson, kaj ĉar ambaŭ estas ĉiujare menciataj en la Jarlibro de UEA (paĝoj 81/82 en 1980) oni supozus, ke la instruistoj utiligus ilin.

Mi konfesas, ke dum la pasintaj pluraj jaroj mi ne povis multe varti "Geonklojn", kio tial iom stagnis, sed la ciferoj pri la Kastora Klubo ja estas interesaj. Dum la lastaj kvin jaroj aliĝis 493 infanoj, el kiuj 318 (64,5%) estas en la orienteŭropaj landoj. En la okci-denta Eŭropo aliĝis nur 82, nome 51 en Italio, 18 en FR Germanio, 10 en Francio, kaj po unu en Britio,

Svedio kaj Hispanio. De la ekstereŭropaj landoj venis 93, 90 el ili en Japanio.

Nun mi volus revigligi la pli malnovan el ĉi tiuj servoj, nome Geonkloj Esperantistaj (fondita en 1958), kaj volonte aŭdos de infanoj, kiuj dezirus korespondi kun onklo aŭ onklino en alia lando. Oni bonvolu noti, ke la infanoj mem devas skribi (por montri, ke ili kapa-blas skribi leterojn) sed, kompreneble, estas la gepa-troj aŭ la geinstruistoj, kiuj devos instigi ilin! Mi povas atesti, ke (kvankam iuj infanoj ne daŭre korespondas — foje eĉ ne respondas!) iuj korespondadoj jam daŭras almenaŭ 20 jarojn!

Se, rezulte de ĉi tiu alvoko, mi ricevos amason da petoj, mi kompreneble bezonos ankaŭ pliajn geon-klojn, kaj volonte sendos al volontuloj (kaj al instruistoj de infanoj ĝis 16-jaraj) plenajn informojn pri la servo. Kaj fine, ĉar ambaŭ servoj estas senpagaj al la infanoj, kaj mi havas nenian oficialan subvencion, mi bonvenigus ankaŭ monhelpon por daŭrigi ilin. Mia adreso estas: J.H. Sullivan, 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Anglio M31 1PS.

Estis bele en Elvskogen

En niaj postkongresaj numeroj aperas kutime nur kelklinia mencio de la Infana Kongreseto. Tiel okazis ankaŭ post Stokholmo en 1980. Malfrue ni ricevis (ĉar ni malfrue petis ĝin) la sekvan raporton de la ĉefa prizorganto de la 18a Internacia Infana Kongreseto. Ni aperigas ĉi tiun bele kaj klare verkitan tekston, ĉar ĝi enhavas plurajn interesajn konstatojn, kiuj povas utili al la organizantoj de la estontaj aranĝoj samspecaj, i.a. al tiuj, kiuj prizorgos la 19an Infanan Kongreseton en Brazilio ĉi-jare.

DUDEK OK INFANOJ el dek tri landoj, dek tri gvidantoj el ses landoj, homoj inter du kaj sesdek kvin jaroj, kun lingvoscio inter nula kaj bonega — jen la 18a Infana Kongreseto en 1980, en Elvskogen, ĉirkaŭ 35km sude de Stokholmo, Svedio.

Kion do raportu pri la okazintaĵoj? Mi rigardas ĉion tra iom koloraj okulvitroj. Ĉar mi neniam antaŭe partoprenis infanan kongreseton, mi ne havas ion por kompari. Parolante kun la aliaj gvidantoj mi tamen baldaŭ komprenis, ke ni en Svedio bonege sukcesis almenaŭ pri unu afero — elekto de restadejo. Elvskogen, kie ni vivis dum la kongresa semajno, estis tre konvena

bildojn kaj aranĝi la taglibrojn tute laŭ sia plaĉo kaj kapablo.

Ni tamen baldaŭ rimarkis, ke estas malavantaĝo havi la plej etajn infanojn en la sama ĉambro, kie la pli grandaj laboras. La etuloj ne havis la saman eltenemon kiel la pli aĝaj, do ili rondkuris kaj ofte forlogis ankaŭ la pli aĝajn kamaradojn. Estis ankaŭ malfacile resti interne, kiam la suno tiel brilis kaj logis. . . La lingvan ekzercadon ni do devis praktiki dum ni ludis aŭ promenis. Estas malfacile diri, ĉu tiuj infanoj, kiuj antaŭe ne multe sciis, pliriĉigis aŭ ne sian vortprovizon dum la kongreseto. Ili tamen ĉiuj brave klopodadis uzi sian scion por kompreni kaj komprenigi sin.

Ni ne dividis la infanojn en specialajn grupojn. Ili tute laŭplaĉe rajtis elekti ĉiutage novajn lud- kaj labor-kamaradojn kaj ŝajnis al mi, ke ĉiu iom post iom ekkonis ĉiun. Ankaŭ la gvidantoj ne havis, krom nokte, ian propran grupon por prizorgi. Tiamaniere la infanoj al kutimiĝis ĉiam turni sin al la plej proksima plenkreskulo por ricevi sciigojn kaj helpon. La programo estis sufiĉe libera — nur manĝohorojn kaj la horojn por kompilado de taglibroj ni vere respektis. Krom la promenoj, naĝado kaj restado en la naturo, ni faris kelkajn vizitojn al la urbo. Ŝajnis, ke promeno tra la centraj partoj de la urbo (lekante grandegajn glaciaĵojn) ne lacigis eĉ la plej etajn partoprenantojn. Ni ankaŭ prezentis nin al la Universala Kongreso malfrue vespere, antaŭ ol rigardi belan polan pupteatron. Tre bela ĝi estis, sed tro malfrua por duono de la infanoj, kiuj tutsimple endormiĝis. . .



loko por viglaj infanoj. Ĉirkaŭ la vilaĝeto de la Junulara Ruĝa Kruco, kies domojn ni luis, estas bela kaj "sovaĝa" naturo. Niajn "liberajn" horojn ni do povis pasigi ludante sur herbejoj inter la dometoj, promenante laŭ la arbaraj padoj, plukante mirtelojn aŭ frambojn, naĝante en plaĉa baseno aŭ ŝvitante en la saŭno, kiun ni disponis.

Pasigi la liberan tempon do ne estis problemo. Iom pli komplika fariĝis la afero kiam temis pri lingvoekzercado. Diversaj niveloj de lingvoscio kaj matureco ĉe infanoj postulis iom pli da fantazio flanke de la gvidantoj. Parte ni sukcesis, ĉar la infanoj ĉiun antaŭtagmezon diligente verkis por siaj taglibroj, kiujn ili tute persone aranĝis. Bonŝance ni estis sufiĉe multaj plenkreskuloj por povi helpi ilin. Ni ankaŭ havis multe da materialo, tiel ke ili povis desegni, skribi, glui

La dua urba vizito estis ekskurso al la liberaera muzeo Skansen, kie la infanoj povis vidi iom da sveda historio en la malnovaj biendomoj, preĝejoj, lernejoj kaj aliaj kulturaĵoj. Ankaŭ interesis ilin la tipe nordlandaj bestoj en la tiea zoologia ĝardeno. Por la plej aĝaj infanoj ni, fine, aranĝis ankoraŭ unu ekskurson en la urbon, por ke ili povu en paco pririgardi kaj butikumi. Ĉiutage ni havis ĉe ni kelkajn vizitantajn gepatrojn kaj ĵurnalistojn, kaj dank' al bone organizitaj transporteblecoj ankaŭ la gvidantoj povis de tempo al tempo viziti la UK.

Ĉe la adiaŭo kaj la infanoj kaj la gvidantoj konstatis, ke la kunestado estis agrabla, sed tro mallonga. Ni tamen esperas, ke la agrablaj travivaĵoj kune helpas al la infanoj konservi la amikajn kontaktojn kaj igi ilin provi renkontiĝi denove.

Alja Öfors

Prefere dise

Recenzas Boris Kolker (Soveta Unio):

Nuancoj; Poemoj, Kazimierz Szczurek kaj Lina Gabrielli. Ascoli Piceno: Edizioni Gabrielli, 1980. 125p. 20cm. Plejado. Beletra eldonserio n-ro 13.

Kiel prave diras en la antaŭparolo William Auld, "Lina Gabrielli estas samtempe homo sincera kaj poeto aŭtentika". Ĝiaj miniaturoj estas veraj perloj. Ili estas vortumitaj impulsoj, ĝuoj, ĝojoj, emoj, sopiroj, ĝemoj, veoj. Malpli entuziasme mi rilatas al ĝiaj pli longaj versaĵoj, kiuj ŝajnas al mi enhavi tro da rezonado, tro da vortoj. Eble, pro alispeca edukiĝo; mi ne povas dece aprezi la verketojn, kiuj tuŝas religiajn temojn. La aŭtorino uzas versteknikon senriman kaj sen organizita ritmo, kiu konvenas precipe al ĝiaj pri-amaj miniaturoj.

La kontribuo de Kazimierz Szczurek konsistas el kvar partoj: "El tradukaĵoj", "Tekstoj por muzikaĵoj", "El versaĵoj originalaj", "Nuancoj". La aŭtoro uzas ĉefe tradician versteknikon. Sed la ritmo estas ofte neklara, oni stumblas ĉiupaŝe, ĉar por konservi la netecon de la ritmo oni devas jen transmeti vortakcenton, jen tute senakcentigi vorton. La rimoj estas neimpresaj, fojfoje ili estas nuraj asonancoj. La verketoj malmulte tuŝas la sentojn, des pli la menson. Deklaracioj pri noblaj idealoj kaj kulturaj valoroj, eble, efikas en oratoraĵo, sed en la poezio — ne. Se Szczurek partoprenus belartajn konkursojn, kiujn aranĝas sovetiaj esperantistoj, eble nur du liaj versaĵoj povus pretendi al premia loko: "Tamen" kaj "Preludo XXXV".

Mi ne vidas sencon kunigi sub unu kovrilon verkojn de du diversaj poetoj.

Mendu ĉe UEA: 14,70 (por Nederlando 15,29) gld., plus sendokostoj 10%.

Plia estona ponto

Recenzas W.A.M. van Heugten (Nederlando):

Al abelujo ĝi flugas, de Juhan Liiv (1864-1913). El la estona trad. Hilda Dresen. Tallinn: Eesti Raamat, 1980. 158p. Ilus. 17cm.

Juhan Liiv estas unu el la plej gravaj verkistoj de la estona literaturo. Poemojn de li oni povis trovi jam en la *Estona antologio*, kiu aperis en 1932 en Tallinn.

Ĉi tiu elekto montras homon, kiu vivadas sub la premo de zorgoj kaj mizero, kaj malgraŭ tio li kantas. Siajn temojn Juhan Liiv trovis simple en la ĉiutaga vivo (la naturo, arbaro, maro) sed ankaŭ en la senesperaj konstancoj de sia ekzistado (li malsanis de skizofrenio). Pozitiva temo en lia poezio estas lia granda

amo por Estonio. Liiv kvietigas sian koron per la entuziasma konstato, ke la patrujo estas kvazaŭ abelujo, al kiu, ĉiam kaj de ĉie, la abeloj de liaj sentoj, sopiroj kaj idealoj rapide reflugas. La kolekton enkondukas artikolo de Aarne Vinkel, kaj la libro finiĝas per 25 poemetoj, kiuj pli-malpli havas la karakteron de aforismoj.

Ĉu la traduko estas sufiĉe bona? Eksterlandaj gelegantoj ne kapablas kompetente juĝi tion. Sed, ĉu Hilda Dresen ne jam delonge estas eminenta, pleje pro siaj tradukoj el la estona?

La poezia kolekto *Al abelujo ĝi flugas* denove montras la pontan valoron de Esperanto: per ĉi tiu traduko ni povas ekkoni — aŭ ekkoni pli bone — gravan reprezentanton de la literaturo de malgranda nacio.

Mendu ĉe UEA: 4,50 (por Nederlando 4,68) gld., plus sendokostoj 10%.

Enfokusigo de la ĉiutago

Recenzas Mauro Nervi (Italio):

Tri noveloj, de Stjepan Krčmar (1920-). El la kroat-serba tradukis Josip Velebit. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1980. 69p. 20cm.

La libro enhavas tri mallongajn prozaĵojn de Stjepan Krčmar, kroata verkisto, kiu depost 1945 produktis kvar novelarojn kaj unu pli longan rakonton; la ĉi-prezentitaj verkoj apartenas al lia lasta volumo "Antikva horloĝo" (1978). Certe, ili ne sufiĉas por kontentige skizi la stilon kaj la temaron de la aŭtoro, kaj do la legantoj sciuj, ke ajnan prijuĝon nepre subtenas la nefidinda marĉo de supozoj, anstataŭ la firma grundo de dokumentitaj konstatoj. Tio estas neevitebla, se temas pri literaturo, kies sistema tradukado en Esperanton apenaŭ ekzistas.

Nu, la unua impresado estas, ke la literatura esploro de Krčmar emas realisme enfokusigi momentojn de la ĉiutago kaj ilin analizi samtempe el la vidpunktoj de psikologio (ĝis ekscesa, kaj foje eĉ teda detalemo) kaj de sociologio (aplikita al la nuna jugoslava situacio).

La novelo, kiu miatakse plej bone konkretigas tiun ĉi analizon simbiozon, estas "La postmilita stacidomo": Ignaco Bogomolec, stacidoma vagulo, konfuzite kaj scivoleme aŭskultas bruojn, kriojn, larmojn: hazardajn fragmentojn, kiuj nerimarkite mozaikas la historion kaj la kulturon de popola, iama Jugoslavio, kaj la antaŭsignojn de Jugoslavio ankoraŭ konstruota.

Malpli efikas la aliaj du noveloj: "Antikva horloĝo" miksas esploron pri la geedzaj problemoj de mezaĝa paro kun satiro kontraŭ etburĝeco; "Patro" vere iom malsobre larmoverŝas pri la tedaj kompleksoj de studentino pri filozofio, kiu naskiĝis eksteredzece. Oni rimarkas ĉi tie ian mankon de kohera temaro; probable ne ĉiujn legantojn kontentigos la rimarko, ke la aŭtoro "porparolas iun pli bonan kaj pli homan vivon, ol estas tiu ĉi vivo, kiun ni konas", kiel sin esprimas la

tamen eminenta tradukinto Josip Velebit en sia post-parolo. Tiaj streboj ja aspektas banalaj, se nenio pli suka fortikigas ilian framon.

Mi eklegis *Tri noveloj* kun arda scivolemo pri la kroata literaturo, kaj spertis partan seniluziigon. Tiu ĉi broŝureto povos tamen ekhavi grandan valoron, se ĝin sekvos aliaj kun pli riĉaj tradukdonacoj, ne nur el prozo, sed ankaŭ el poezio (la kroatserba liriko havas eminentajn nomojn: Daviĉo, Pavloviĉ, Mađer). La Internacia Kultura Servo en Zagrebo, kiu aperigis *Tri noveloj*, devus plenumi la taskon: okcidentanoj bezonas tiun ponton, kaj senpacience atendas ĝian konstruon.

Mendu ĉe UEA: 5,10 (por Nederlando 5,30) gld., plus sendokostoj 10%.



Laste aperis...

Deutsch-Esperanto. Wien: Österreichische Esperanto-Bewegung, 1980. 48p. 13cm. AEM-Serio 2. Vortareto en la formo de "maŝlosilo". Prezo: 1,80 gld.

Esperanto-Deutsch. Wien: Österreichische Esperanto-Bewegung, 1980. 30p. 12cm. Ŝlosilo: gramatiko, vortareto. Prezo: 1,20 gld.

Esperanto in der Praxis. Red. Herbert März kaj Helmut Illetschko. Wien/Nürnberg: AEM/L. Pickel, 1977. 51p. Ilus. de Herta März. 21cm. AEM-Serio 1. Enkonduka lernolibro, kun Esp-a/germana vortareto. Prezo: 4,80 gld.

Esperanto-persa vortaro, Mahmud Moŝkeri. Tehran, 1980. 16+350p. 22cm. La unua ampleksa Esperanto-vortaro en unu el la lingvoj de la meza Azio. Prezo: 22,80 gld.

Formação das palavras em Esperanto, A. A.S. Almeida. Lisbono: Portugala Esperanto-Asocio, 1980. 47p. Multobligita. 21cm. Prezo: 2,70 gld.

Historiaj radikoj de nealianciĝo, La, Edvard Kardelj. Tradukis Roger Imbert. Sarajevo: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1980. 65p. 20cm. Prezo: 6,00 gld.

Konttinen: Profetino Helena Konttinen (1871-1916), K.K. Sarlin (1871-1957). El la finna tr. (1974) L. Hanhiniemi. Ingham: La tradukinto, 1979 (dua, kompletigita eldono). 226p. Ilus. 21cm. Prezo: 11,10 gld.

Lingvaj tradicioj kaj reguloj, Koiĉi Ŝimizu. Aktuale, 1980 (ne indikite). 20p. 26cm. Ofsetita manuskripto de esperantologia prelego. Prezo: 1,80 gld.

Metodo 11, La; Gvidlibro por uzi utile la rapidkurson. Paris: UFE, 1980. 24p. Multobligita. 30cm. Por instruistoj, kiuj uzas la lernolibron *La metodo 11*. Prezo: 12,90 gld.

Metodo 11, La. Paris: Union Française pour l'Espéranto, 1980. 76p. Ilus. 21cm. Rapida kurso, en dek lecionoj plus "kroma leciono". Vortprovizo limigita al ĉ. 500 plej oftaj radikoj. Prezo: 15,60 gld.

Mikronoj, Diderto Freto. Rio-de-Janeiro: La aŭtoro, 1980. 27p. 22cm. Duvortaj poemoj. Kuriozaĵo. Prezo: 3,90 gld.

Pekoj de l' infaneco (1883), Bolesław Prus (ps. de A. Głowacki, 1847-1912). El la pola tr. Antoni Grabowski (1857-1921). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1980 (represo). Rakonto pri petolema filo de bona mastrumanto. Prezo: 9,00 gld.

Pendumilaj lidoj (1908), Kristiano Morgenŝterno (1871-1914). El la germana tr. Rikardo Ŝulco. Gerlingen: Bleicher Eldonejo, 1980. 108p. Ilus. de la tradukinto. 18cm. ISBN 3 88350 501 3. Humuraj versaĵoj. Prezo: 13,80 gld.

Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935), K. Kalocsay (1891-1976) kaj G. Waringhien (1901-). Rotterdam: UEA, 1980 (4a tralaborita eld.). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 022 0. La plej detala kaj fidinda priskribo kaj preskribo de la ĝusta uzado de la Internacia Lingvo. La normverko sur sia kampo. Prezo: 48,00 gld.

Praktika poŝkalendaro de Monato. Red. S. Maul. Brasschaat: TK/Stafeto, 1980. 128p. 15cm. Kalendaro, po unu semajno en paĝo, kun spaco por notoj ĉe ĉiu dato. Aldoniĝas almanakecaj informoj pri i.a. unua helpo, korespondado, ŝoforado, geografio. Prezo: 10,20 gld.

Skizoj, Peter Altenberg (1859-1919). El la germana tr. Grete Breunlich. Wien: Aŭstria Esperanto-Instituto, 1980. 32p. 21cm. Prozpecetoj jen aŭtobiografiaj, jen ŝercaj, jen filozofiaj. Prezo: 6,00 gld.

Tito, D. Stuparić, M. Krleža kaj I. Borovečki. Tradukis diversaj. Zagreb: Kroatia Esperanto-Ligo/Internacia Kultura Servo, 1980. 121p. 20cm. Du biografiaj eseoj kaj artikolo pri la sinteno de la jugoslavia ŝtatestro al Esperanto. Prezo: 15,00 gld.

Tundro ĝemas, La; El vivo de ĉukĉoj, V. Eroŝenko (1890-1952). Kompilis Yositaka Mine. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1980. 83p. Mapoj. 18cm. Skizoj pri la vivo de malgranda arkta gento en Soveta Unio, parte transskribitaj laŭ brajla originalo. Prezo: 10,50 gld.

Zamenhof, Creator of Esperanto (1960), Marjorie Boulton (1924-). London: Routledge and Kegan Paul, 1980 (represo). 12+223p. Ilus. 21cm. Anglalingva versio de la plej bona biografio de Zamenhof ĝis nun. Kun informoj ankaŭ pri la Movado de post lia morto, precipe pri la naziaj persekutoj. Prezo: 23,10 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,— guldonoj.** Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,— gld.**

La Paperoj de Wappers

En kiu alia libro vi povas informiĝi ne nur pri indiana fiŝkaptado, sed ankaŭ pri la forfalo de la akuzatavo en latinidaj lingvoj, kaj cetere pri tiuj interesej etuloj la formikoj? Carlos Wappers (1898-1964) estis argentina esperantisto de neordinare vasta klereco, kies unuvoluma esperantlingva verkaro ĵus ricevis novan, pli malaltan prezon. Kontribuu vian baton kontraŭ inflacio per mendo! Buenos Aires/Rio de Janeiro: AEL/KKE, 1969. 128p. 18cm. Prezo: 3,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA.

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio, W11 4UF.

EKSTERAJ RILATOJ DE TEJO:

De Strasburgo ĝis Bangaloro kaj reen

NUNTEMPE TEJO ne havas dungitan volontulon por siaj eksteraj rilatoj. Sed en la lastaj monatoj reto de aktivuloj kolektiĝis ĉirkaŭ la planoj faritaj pasintjare en la strasburga seminario (v. nian numeron de julio/aŭgusto 1980). TEJO nun prenas aktivan rolon en la diskutoj por starigi tut-eŭropan junularan kaj studentan unuiĝon. Okazis en Budapeŝto, meze de oktobro 1980, dutaga konferenco pri tiu temo, kun partopreno de pli ol 500 naciaj kaj 28 internaciaj junularaj organizaĵoj. Inter la 28 troviĝis TEJO, kiu tien sendis C. Lendvay (prezidanto de TEJO) kaj A. Lukács. En Bangaloro (Hinda Unio) okazis fine de novembro konferenco de Internacia Konsulta Organizo, kiu strebas al internacia paco, ekonomia kaj socia reformado kaj respekto al homaj rajtoj. Por informiĝi pri ĉi tiu iom nova organizaĵo kaj esplori pri eblecoj kunlabori, TEJO tie reprezentis pere de Patrick Boets (Belgio), kiu nuntempe vojaĝas tra Hinda Unio kaj Nepalo.

La 3an de decembro Barbara Despiney (Francio) reprezentis la Organizon en la 48a sesio de la Ĝeneva

Neformala Kunveno (ĜNK) kiu tamen okazis en Parizo. Tiu junulara forumo de Unuiĝintaj Nacioj faras planojn, interalie, por la Internacia Jaro de la Junularo en 1985. Ankaŭ la 49a ĜNK ne okazos en Ĝenevo sed en Vieno, komence de februaro, kie d-ro H. Maitzen estos la reprezentanto de TEJO. La junulara fako de UN transiris lastatempe de Ĝenevo al Vieno.

Multe pli norde, Helsinki gastigos, de la 19a ĝis la 21a de januaro, grandan internacian forumon pri malarmado. TEJO sendos tien C. Lendvay (Hungario) kaj E. Schwarzer (FR Germanio). Tuj poste en Stokholmo okazos preparkunveno por estonta konferenco pri protektado de la medio kaj TEJO estas invitita sendi reprezentanton por helpi en la planado.

Strasburgo evidente restos sur la mapo de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER). Ĵus venis informo, ke propono de TEJO pri nova seminario en la Eŭropa Junulara Centro estis akceptita. Ĝi okazos de la 30a de majo ĝis la 6a de junio 1981, kun loko nur por 30 gejunuloj. La temo ĉi-foje estos ne pri Esperanto mem: "Monda ekonomio kaj laboro por junuloj — bezonata: Nova internacia ekonomia ordo". La enhavo de *Kontakto* 80/3 pri komparaj ekonomiaj sistemoj rolas kiel prepara dokumento. Denove, TEJO ĝuos bonegajn fizikajn kondiĉojn por realigi tiun seminarion.

Kvazaŭ tio ne sufiĉus, la KER-aktivuloj pretigis peton al la Eŭropa Junulara Fondaĵo por subvencio de dua seminario en 1981. Tiun oni organizos, se sukcesos la subvencipeto, en Lille (Francio) en septembro, kun provizora temo "Lingvaj kaj komunikaj rajtoj kiel homaj rajtoj". TEJO do multe vojaĝas: de Strasburgo ĝis Lille, sed tra Bangaloro kaj Helsinki!

S. MacGill

LABORTENDAROJ:

Ĉu vi planas labore tendumi?

AL LA OFICEJO de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO plej ofte venas leteroj de ne-esperantistoj, kiuj petas informojn pri labortendaroj organizitaj de TEJO, pri ĝiaj landaj sekcioj kaj pri lokaj grupoj. En la sesdekaj jaroj tiaj labortendaroj estis grava aspekto de nia agado, kaj per ili multe da gejunuloj ricevis sian unuan sperton pri Esperanto. Tiel oni prezentis la Internacian Lingvon ne je teoria nivelo sed laŭ tute praktika maniero, kaj konvinkis, ĉar la multnaciaj partoprenantoj tuj konstatis la oportunecon de unu neŭtrala komunikilo por ĉiuj en la tendaro. La adreso de TEJO komencis aperi en la jarlibroj kaj katalogoj de diversaj internaciaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri la tutmonda kunordigo kaj publikigo de tiaspecaj aranĝoj. Estas rimarkinde, ke ankaŭ la junulfako de Unesko eldonas tian katalogon, en kiu TEJO figuras. Ni

tiel havas konvenan eblecon diskoniĝi kiel organizaĵo, kiu okupas sin pri labortendaroj.

Ankoraŭ nun estas evidente, ke la entuziasmo pri labortendaroj ne malkreskis, kaj en la seminario en Strasburgo (1980), la gvidantoj de TEJO substrekis la gravecon reaktiviĝi sur ĉi tiu kampo. Martin Haase, juna germano, estis nomita kiel komisiito pri labortendara agado kaj lia prioritata tasko estas kompili raporton pri la tendaroj, kiujn en ĉi tiu jaro planas kaj aranĝas la diversaj Esperantaj junularaj organizaĵoj. La celo estas pere de tiu raporto havi detalajn informojn por disponigo al niaj informpetantoj. Pli bona informservo certe pligrandigos la nombron de partoprenantoj en la ekzistantaj tendaroj, kaj instigos al la organizado de pliaj.

Cirkulero jam estas sendita al la landaj sekcioj de TEJO por peti informojn, sed okazos eventoj ankaŭ ekster iliaj kadroj. Se vi havas informon pri tendaro en via lando, kiu utiligos aŭ instruos Esperanton, bonvolu sendi detalojn, nepre ĝis la 1-a de marto 1981 al: Martin Haase, Kiebitzweg 9, D-4600 Dortmund, FR Germanio.

Unuiĝintaj Nacioj

- Fine de la pasinta jaro leviĝis en la Kvina Komitato de la Ĝenerala Asembleo demando pri tradukaj servoj de UN. Ampleksan raporton pri tiu temo publikigis lastatempe la Komuna Inspekta Unuo de UN. UEA intervenis por atentigi pri la mankoj en tiu raporto kaj distribuis al ĉiuj misioj ĉe UN detalan kritikon ellaboritan de Claude Piron. Kvan-kam tio vekis intereson ĉe kelkaj delegacioj, la raporto estis fine akceptita sen rimarkoj. La Nov-Jorka Oficejo de UEA daŭre okupiĝas pri ĉi tiu demando.

Aŭstrio

- En septembro 1980, Aŭstria Esperanto-Instituto skribis al pluraj ŝtataj instancoj pri apogo al la Internacia Lingvo kaj, precipe, pri intensigo kaj oficialigo de ĝia instruado en la lernejoj. Ampleksa respondo venis i.a. de la registara ĉefoficejo. En tiu letero de la 2a de decembro 1980, estas dirite i.a., ke "la Federacia Registaro nepre konscias pri la signifo kaj eblecoj de la Internacia Lingvo Esperanto." La letero atentigas, ke pro tiu konscio la registaro de Aŭstrio daŭre reprezentigas en la

Universalaj Kongresoj. Tamen, la registaro ne favoras la proponojn de la Instituto, unuavice pro la manko de konkreta apogo al Esperanto fare de la gravaj internaciaj organizaĵoj kiel Unesko, kies programo por 1981-1983 "ne entenas agadojn por la akcelo de Esperanto."

Nov-Zelando

- En *Nov-zelanda esperantisto*, ekde la numero 6/1980 komencis aperi "Eksperimenta maoria-Esperanta vortareto". Supozeble, temas pri la unua esperantaĵo de la nov-zelandaj indiĝenoj.

Usono

- La Nov-Jorka Oficejo de UEA pozitive influas la ĝeneralan viglecon de la loka Esperanto-movado. La 13an de decembro, la Oficejo organizis kunvenon okaze de la Zamenhofa Tago. Parolis prof. William Orr, prezidanto de la Nov-Jorka Esperanto-Societo, kaj d-ro John Lewine, oficiala reprezentanto de la Usona Asocio pri UN. Partoprenis kaj mallonge parolis ankaŭ s-ro R. Kristosyk, konsilanto de la Pola Misio ĉe UN. La kunvenon gvidis d-ro H. Tonkin. Pli poste, en

sia numero de la 14a de januaro 1981, la prestiĝa ĵurnalo *New York Times* aperigis longan kaj simpatian tekston pri Esperanto.

Argentino

- Fine de novembro fondiĝis Esperanto-klubo en grava provinca urbo Córdoba. La nova klubo volonte starigus kontaktojn kun alilandaj lokaj organizaĵoj. Adreso: Esperanto-Klubo, Obispo Trejo y Sanabria 708, RA-5000 Córdoba, Argentino.

Brazilo

- La 66an Universalan Kongreson en Brazilio preparas nekutime june-ca LKK. Ke ili estas ankaŭ diligentaj pruvu jenaj informoj pri kvar gemembroj de la LKK: Neima Cardoso Adorno diplomiĝis en decembro 1980 pri pedagogio (temo "Kiamaniere enkonduki Esperanton en la mezlernejojn de Brazilio"); sammonate kaj en la sama fako diplomiĝis ankaŭ Josias Ferreira Barbosa. Duonjaron pli frue pri juro diplomiĝis José Carlos Vieira, kaj siajn bibliotekistajn studojn finis Neia Lucia Souza. Nu, restu nun al ili amaso da libera tempo por okupiĝi pri la kongrespreparoj.

Hispanio

- Kataluna Klubo de Amikoj de Unesko (Esperanto-Fako, Carrer Ausiàs Marc 29, 1r, Barcelona 10, Hispanio) organizas limerik-konkurson. Oni sendu siajn kvinversajn ŝercajn poemetojn al la supra adreso antaŭ la fino de marto 1981.



- Ĉinio: Esperanto en Ĉinio progresas pli rapide ol ni sukcesas prinoti en la revuo. Okazas ankaŭ ĉiam pli kaj pli da eksterlandaj movadaj vizitoj. Nia foto koncernas unu el ili. Tamen, la plej signifa evoluo en la ĉina Esperanto-movado estas la kreo de la organiza strukturo (tuta aro da regionaj kaj lokaj organizaĵoj fondiĝis lastatempe) kaj denova enkonduko de Esperanto-kursoj en la universitatojn kaj altlernejojn. Nun funkcias almenaŭ kvin tiaj Esperanto-kursoj.

EĈ SURVOJE VI POVAS FARI ION MOVADE UTILAN!

Se vi intencas vojaĝi al Afriko, Azio aŭ Latinameriko. . . Esperantistoj kiuj pro ferioj aŭ pro profesio vojaĝas al landoj en tiuj mondpartoj, povas tre utili al la Movado. Se vi planas tian vojaĝon, vi povus antaŭe kontakti la Centran Oficejon de UEA por havi adresojn de izolitaj esperantistoj en la vizitotaj landoj. La funkciuloj de UEA, kiuj prizorgas la kontaktojn kun tiuj esperantistoj en Afriko, Latinameriko kaj Azio, en la kadro de la t.n. Regiona Agado, volonte korespondos kun vi por informi vin pri via ebla tasko kaj konsili kiel vi povos esti utila por Esperanto dum via vojaĝo.

Esperantologio

- Ekde 1978, kiam ĝi unue eniris la programon de la Universala Kongreso, la Esperantologia Konferenco fariĝis tre populara forumo de fakaj konstatoj kaj teorioj pri la Internacia Lingvo. Ĝia kvara sesio okazos en la 66a UK, kun la kadra temo "Problemoj de la evoluo de Esperanto". Eventualaj referontoj sin proponu al la organizanto, d-ro Detlev Blanke, Centra Laborrondo Esperanto, Charlottenstr. 60, DDR-108 Berlin, Germana DR.

Lingvistiko

- En la periodaĵo *Skrifter om Anvendt og Matematisk Lingvistik* (Artikoloj pri aplikita kaj matematika lingvistiko), kajero 7, ISSN 0106-8563, eldonita de la Instituto por Aplikita kaj Matematika Lingvistiko ĉe la Universitato de Kopenhago, aperis ampleksa studo de Preben V. Bagger, sub la titolo "Terminologiaj problemoj ĉe mencioj pri Esperanto en danaj leksikaj kaj vortaraj artikoloj". La libro, kiu aperis fine de 1980, enhavas kvar aliajn studojn samfakajn.

Scienco

- En nia numero de aprilo 1980 (p. 76) ni menciis la ĉinan fakan revuon *Entomotaxonomia*, kiu regule aperigas resumojn en Esperanto. Fine de 1980 atingis nin ankaŭ la libro *Historio de ĉina entomologio*, kiu krom la titolo en Esperanto havas ankaŭ 17-paĝan resumon en la Internacia Lingvo. La libron verkis prof. Io Chou, fama ĉina entomologo kaj esperantisto, redaktoro de la menciita faka revuo pri klasigo de insektoj.


Rotarianoj

- *The Rotarian*, oficiala revuo de la granda organizaĵo Rotario Internacia, aperigis en sia numero de januaro 1981 longan informan tekston pri Esperanto. Estas verŝajne unuafoje, ke ĉi tiu influa revuo (ĉ. 500 000 legantoj en 154 landoj) skribis pri Esperanto. La apero de la teksto sekvis el interkonsento atingita de Grahame Leon-Smith, prezidanto de esperantista rotaria organizaĵo, dum la pasintjara inter-

nacia kongreso de rotarianoj en Usono (v. nian revuon de julio/aŭgusto 1980, p. 139).

Televido

- Esperanto estas malofta temo en la svisaj televidaj programoj. Tio tamen okazis la 15an de decembro, kiam la franclingva svisa televido dediĉis 20 minutojn al la Internacia Lingvo. C. Gacond parolis pri la Esperanta vortprovizo, C. Piron rakontis pri la malsameco de la spertoj kiam oni uzas Esperanton kaj iun el la naciaj grandlingvoj. Temis ankaŭ pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj pedagogia valoro de la lernado de ĝi. La



elsendon ilustris kanzonoj de O. Tzaut. La programon partoprenis ankaŭ N. Piron, A. Bickel kaj J.J. Lavanchy.

Persone

Boulton

- La 8an de novembro, d-rino Marjorie Boulton prelegis en Stoke-on-Trent, Anglio, al la Societo Arnold Bennett, pri tradukoj el la verkoj de tiu fama brita aŭtoro. Antaŭe, lia bibliografio enhavis nur unu tradukon kaj presitaj leteroj menciis aliajn nur alude. Estis plejparte per la helpo de esperantistoj, ke d-rino Boulton elfosis entute 263 tradukojn, en tre diversaj lingvoj. Tre impresis la aŭdantaron ne nur la kvanto de novaj informoj, sed la uzado de Esperanto kiel ilo por altnivelaj fakaj esploroj. Marjorie Boulton nun regule recenzas Esperantajn tradukojn el anglalingvaj verkoj literature valoraj, por la altprestiga, internacie distribuata faka gazeto por anglaj studoj, *Notes and Queries*.

Podkaminer

- Unu el la plej elstaraj figuroj de la Esperanto-movado en Soveta Unio, Simeon Naumoviĉ Podkaminer, fariĝos 80-jara la 11an de februaro 1981. Podkaminer, kiu studis muzikon kaj teknikon, profesoris kaj estis rektoro ĉe la Aertrafika Altlernejo en Leningrado, lernis Esperanton en 1920. En 1921 li jam estis inter la organizantoj de la 1-a Sovetunia E-Kongreso, kaj en 1926 li estis sekretario de la 6a Kongreso de SAT en Leningrado. Poste, ĝis la

malapero de Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo en 1937, Podkaminer estis i.a. prezidanto de ĝia junulara sekcio kaj membro de la Centra Komitato de SEU. Post la dua mondmilito li multe kontribuas al la restarigo de organizita Esperanto-movado en la lando. Pruvo pri tio estas la fakto, ke la siatempe vigla, neoficiala, junulara Esperanto-movado elektis Podkaminer sia honora membro. Kiam en 1979 fondiĝis Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, Podkaminer fariĝis unu el ĝiaj vicprezidantoj. Podkaminer verŝajne estas la sola aktiva postvivinto el la "ora epoko" de la sovetia Esperanto-movado el la periodo inter la du mondmilitoj.

Tonkin

- La 18an de decembro 1980 d-ro H. Tonkin, estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj, denove prelegis pri Esperanto en la sidejo de Unesko en Parizo. La prelegon, kiu okazis laŭ invito de la Fako pri Konferencaj Servoj (precipe ties lingvaj branĉoj), ĉeestis dudeko da tradukistoj kaj interpretistoj. Simila prelego okazis la 15an de aprilo pasintjare. Estas menciinde, ke la laborgrupo, kiu okupiĝas pri la rilatoj inter UEA kaj Unesko, intencas ĉi-jare organizi Esperanto-kurson en la Sekretariato de Unesko en Parizo.

Nourmont

• S-ino Claude Nourmont-Moon (Luksemburgo), komitatano de UEA kaj antaŭa prezidanto de TEJO, pasigos tutan jaron vojaĝante tra la mondo kaj laborante por Esperanto. Ŝi jam komencis tiun agadon per antaŭnelongaj prelegvojaĝoj tra Hungario kaj Pollando. Meze de januaro ŝi forvojaĝis al Hinda Unio, por poste viziti ankaŭ Nepal, Japanion kaj Koreon. Fine de aprilo kaj dum majo s-ino Nourmont-Moon vizitos plurajn latinamerikajn landojn.

Sekelj

• Veninte tien pro konferenco de muzeologoj, mag. Tibor Sekelj restadis en Meksikio dum novembro 1980, i.a. por kunhelpi en la preparlaboroj por la 37a Internacia Junulara Kongreso. Intervjuis lin du radio-stacioj kaj grava ĵurnalo, dum la plej rigardata televida programo faris kun li du duonhorajn elsendojn. En ĉiuj ĉi intervjuoj temis pri Esperanto, kies perspektivoj estis la temo ankaŭ en la interparolo de Sekelj kaj altranga funkciulo de la Edukministerio de Meksikio.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Belgio: E. Ernst 3 000,00. Sumo ĉi-jara 10 274,22.

FONDAĴO TEJO: FR Germanio: E. Herlitze 17,34. Kanado: Kalgaria Esperanto-Grupo 25,51. Nederlando: J.S. Rooke 200,00. Sumo ĉi-jara 1 078,06.

ĜENERALA KASO: Belgio: E. Ernst 750,00; G. Wolff 1 000,00. FR Germanio: M. Gründler 54,21; H. Schröder 21,68. Nederlando: F.H. Kat 22,50; A.C.M. Luyten 10,67; M. Meywes 62,50; W. Rodenhuis 37,50. Diversaj malgrandaj 21,15. Sumo ĉi-jara 5 963,74.

Oficiala Informilo

N-ro 541

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: f-ino Yamasaki. Nederlando: M. Meywes.

SOCIETO ZAMENHOF 1980

NED: 225 W.A. Verloren van Themaat. US: 226 Cecilia Peterson.

SOCIETO ZAMENHOF 1981

BRIT: 1 John Brownlee. JAP: 2 Hideo Shinoda; 3 Wilhelm Schmid. NED: 4 J. Dunnewold-Ehrmann. AŬSTRAL: 5 M. Chaldecott; 6 I. Grahovac; 7 Ralph L. Harry; 8 L.V. Scott. AŬSTR: 9 Grete Breunlich. BELG: 10 L. Bernaerts-Toussaint; 11 Gustaaf Goossens; 12 C. Vanbiervliet; 13 Jules Verstraeten; 14 E.L.M. Wensing. BRAZ: 15 A.K. Afonso Costa; 16 Denisa A. Deslandes; 17 W. Deslandes; 18 Álvaro Rabêlo. DAN: 19 P.O.P. Andersen; 20 Ejnar Hansen. FINN: 21 Vuokko Heinäsuo; 22 Irja Klemola; 23 Liisi Oterma; 24 Aarne Ratalahti; 25 Touko Tähtinen; 26 Veikko Tikkanen; 27 Harri Tuomola. FRANC: 28 Gaston Waringhien. FRG: 29 Louis Beaucaire; 30 Harry Bily; 31 Erdmann Fritsch; 32 Martin Gründler; 33 Helene Hiebel; 34 Bruno Vogelmann; 35 M. von Waldowski. HISP: 36 Ramon Molera Pedrals. JAP: 37 Fujio Egami; 38 Sin'itirô Kawamura; 39 Keniti Matumoto; 40 Takeo Sugano; 41 Koiĉi Ŝimizu. KAN: 42 Dorothy Hawley; 43 Thomas M. Hess; 44 John R. Settle; 45 E.W. Woodruff. NED: 46 L. Adelaar; 47 G.C.A.M. Dercks; 48 I.M.J. Dijkhoff-Lenze; 49 H.C. Luyke; 50 G.B.J. Mantingh; 51 E.S. Otto; 52

G.W.J.B. Peet; 53 W. Rodenhuis; 54 G.H.M. Wulfers; 55 C.B. Zondervan. NORV: 56 Agnete Anjer; 57 Ludwig Anjer; 58 Rolf Bugge-Paulsen; 59 Kjell Gustavsen; 60 Olaf Maeland. SVED: 61 M. Ahlström; 62 G. Börjesson; 63 K. Gustafsson; 64 Leif Holmlund; 65 Henrik Karlsson; 66 Amy H.L. Nilsson; 67 Gustav Nygård; 68 Jan-Olof Svensson. US: 69 F.J. Belinfante; 70 R. Kent Jones; 71 Cecilia Peterson.

DONACIOJ 1980 (Gld.) ĝis la 30a de novembro

ELDONA FONDAĴO: Belgio: E. Ernst 5 000,00. Sumo ĉi-jara 6 044,51.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Nederlando: J.S. Rooke 200,00. Sumo ĉi-jara 7 884,63.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: J.S. Rooke 100,00. Sumo ĉi-jara 5 171,15.

NOV-JORKA OFICEJO: Patronoj (minimуме \$100): Japanio: Oomoto (2311,33 gld.). Kanado: Wallace G. du Temple (\$166,32). Nederlando: Institucio Hodler '68 (2000 gld.). Usono: Richard Andrews; Robert E. Bailey; Alberta Casey; Armin kaj Mary Doneis; Mack X. kaj Betty Lou Dougherty; Rochelle Grossman; John B. Massey; Bruce Arne kaj Judith Sherwood; Chris R. kaj Josephine G. Warnken. Amikoj (minimуме \$10): Kanado: David Winters. Usono: s-ino A.M. Chapman; Joseph Delpino (\$20); Conrad Fisher; Noble Holderread; Theodore kaj Marion Lorie (\$15); Rouvan Lubow (\$12,15); Karl kaj Dorothea Nell; Gertrude Novak; Cecilia Peterson (\$50); s-ino Coe Roberts; Louis Stein; Roan Orloff Stone; Constance Walsh; Oceanids Esperanto Study Group, La Jolla (\$80, "honore al nia inspira instruisto, prof. Ralph Lewin"). Sumo ĉi-jara: 21 230,36 gld.

PROPAGANDA KONTO: Belgio: E. Ernst 15 000,00. Sumo ĉi-jara 15 010,34.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Kiu volas subvencion?

INSTITUCIO HODLER '68 denove invitas petojn pri subvencioj por 1981. Institucio Hodler estas jure memstara instanco, kiu havas la celon kolekti kaj investi kapitalon kaj per ĝiaj rentoj subvencii la Esperanto-movadon. En dek jaroj ĝi disdonis preskaŭ 90 000 guldenojn. Subvenciojn povas ricevi asocioj, fondaĵoj, eldonistoj, verkistoj, tradukistoj, organizantoj de kulturaj aŭ artaj aranĝoj, esperantologoj, sciencistoj k.a., kompreneble ĉiam por konkretaj projektoj aŭ agadoj en rilato al Esperanto.

Se vi intencas peti subvencion, ne jam skribu pri ĝi, sed unue petu (prefere poŝtkarte) demandaron/respondilon ĉe Institucio Hodler '68, p/a Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Vi ricevos klarigojn pri la formo de la subvencipeto, limdatoj ktp.

JANET DE SKOTTE forpasis la 20an de novembro 1980 en Lima (Peruo). Ŝi estis francino, kiu post longa restado en Argentino antaŭ deko da jaroj translokiĝis al Peruo, kaj tie tre fervore ekagis por Esperanto, kiun ŝi mem lernis nur en sia matura aĝo. Ŝi organizis multajn kursojn, ne nur en Lima sed ankaŭ en aliaj peruaj urboj. Fakte, ŝi estis la fondinto kaj la ĉefa animanto de Perua Esperanto-Asocio, kiu nun estas aliĝinta al UEA. La fervoreco de Janet de Skotte memorigas pri la unuaj jardekoj de Esperanto kaj pri la tiama pionira entuziasmo, kiun ŝi praktikis en la nuna epoko, kun multa sindediĉo kaj sukceso. Ŝi faris amason da prelegoj, intervjuigis en gazetoj, prezentadis Esperanton en la peruaj radio kaj televido. Dum pluraj jaroj ŝi estis peranto de UEA.

ANTONIO PINTO (1911-1980), monaĥo de la salesiana ordeno kaj multjara esperantisto, mortis la 27an de junio en Caracas (Venezuelo).

LEANDER TELL (1895-1980), mondkonata speleologo, esperantisto ekde 1908 kaj fondinto de la klubo en Norrköping (Svedio), kie li naskiĝis, lastatempe forpasis en tiu urbo. Tell verkis dudekon da libroj, inter ili du en Esperanto: *La bela subtera mondo*; *Libro pri grotoj* (1959) kaj *Estiĝo de la tero kaj de la homo* (1969), ambaŭ kun popularscienca karaktero. En almenaŭ du svedlingvaj broŝuroj, pri grotoj en Svedio ĝenerale (1963) kaj en Lummelanda (Gotlando) (1974), aldoniĝis resumo en Esperanto.

MARIE PROCTOR (1903-1980), kiu lernis Esperanton en sia junaĝo kaj multe instruis per rekta metodo en Anglio (ĉefe Londono) kaj Skandinavio (kiel Marie Major), mortis la 25an de novembro.


NELLIE JANE CAMPBELL (1888-1980), dumviva membro de UEA kaj de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, mortis la 13an de novembro en Portland (Oregonio, Usono). Ŝi donacis multajn Esperantajn librojn al la biblioteko en Portland kaj finance subtenis la Movadon. Ŝi estis LKKano de la 57a UK (Portland, 1972).



Janet de Skotte



Leander Tell



T.T. Anuruddha

SIMON DE GEUS (1914-1980), delegito de Heiloo (Nederlando) kaj dumviva membro de UEA, forpasis la 23an de novembro. Li esperantistiĝis en 1933 kaj estis inter la unuaj membroj de TJO (nun TEJO). Li kunlaboris pri poŝtmarkvendado por UEA.

ANTONÍN SLANINA (1905-1980), unu el la plej konataj Esperanto-instruistoj en Ĉeĥoslovakio, aŭtoro de rektmetoda lernolibro, kiun ĉi-jare eldonos UEA, mortis post longa malsano la 26an de septembro en Prago. Antaŭ la dua mondmilito li organizis plurajn E-klubojn. Li helpis organizi la famajn radio-elsendojn de la praga "Verda Stacio" kaj kunfondis la Someran Kolegion de Esperanto en Doksy, kiu siatempe ĝuis internacian renomon.

MANUEL DE ELEZCANO Y MAIZTEGUI (1886-1980), esperantisto ekde 1909, plurfoje prezidanto aŭ estrarano de la grupo en Bilbao (Hispanio), mortis la 27an de novembro en tiu urbo. Kiel Esperanta poeto li premiigis en kelkaj literaturaj konkursoj.

T.T. ANURUDDHA, multjara prezidanto de Budhana Ligo Esperantista, jam de kvardek jaroj esperantisto, mortis la 5an de novembro 1980 en Nouméa (Nov-Kaledonio). Naskiĝinte en Ĉeĥoslovakio kiel Rudolf Petri, li fariĝis unu el la plej konataj budhanoj de eŭropa deveno. Lia kredo lin kondukis tra tre multaj landoj; li longe loĝis i.a. en Hinda Unio kaj en Vjetnamio, kie li pasigis naŭ monatojn en malliberejo. Li estis konata inter budhanoj kiel verkisto kaj lingvisto. Du el liaj tradukoj aperis en Esperanto: *Tiel parolis la Budho kaj liaj disĉiploj* (1971) kaj *La vojo al Nirvano aŭ la Dhammapado* (1973).

EDVARDAS MEDIŠAUSKAS-MEDONIS (1905-1980), kiu multe aktivis kaj instruis en Kaunas (Litovio, Soveta Unio), mortis la 21an de aprilo, laŭ lastatempa informo. De 1929 ĝis 1933 li estis redaktoro kaj eldonanto de la monata *Litova Esperanto-revuo*.

DE LA 22a ĜIS LA 28a DE FEBRUARO:



Semajno de internacia amikeco



Amikeco trans limoj

Vi mem kaj via loka Esperanto-klubo certe jam pretiĝis por la ĉi-jara Semajno de Internacia Amikeco. Ĉu vi memoris mendi ĉe la Libroservo de UEA speciale por la Semajno eldonitajn salutkartojn? Per la aĉeto de tiuj kartoj vi subtenas ne nur la idealojn de la Semajno sed ankaŭ

UNICEF, al kiu iras la tuta profito de la vendoj. Dek kartoj kun kovertoj (minimuma mendokvanto) kostas 11,00 guldenojn.

H.P. SAUNDERS, dumviva membro de UEA kaj de Brita Esperanto-Asocio, forpasis fine de 1980 en Thetford.

JOHANO JÁNOS P. STITZ (1901-1980), hungardevena usonano, delegito de Redlands (Kalifornio), tre aktiva membro de la klubo en Los-Anĝeleso, mortis en septembro.

IVAN JARC, multjara membro de UEA, mortis post longa malsano en Rogoza (Jugoslavio).

ANTS MIKK (1921-1980), multjara delegito kaj fakdelegito en Viljandi (Estonio, Soveta Unio), mortis la 2an de oktobro. Li longe aktivis en sia regiono kiel kursgvidanto.

GIUSEPPINA GAMBERINI-BILLI (1895-1980), instruinto de la plimulto de la nuna esperantistaro en Bolonjo (Italio), senlace aktiva en la tiea klubo, forpasis la 26an de novembro. Ŝi dum multaj jaroj estis vicdelegito de UEA.

W.F. RENTMEISTER (1898-1981) mortis la 6an de januaro en Siegen-dorf (Aŭstrio). Li lernis Esperanton jam en 1911 kaj estis unu el ĝiaj plej agemaj adeptoj en Aŭstrio dum preskaŭ sepdek jaroj. Li aktivis ĉefe en Vieno, kie li vivis 60 jarojn. Rentmeister plenumis multajn oficojn en la loka kaj landa movado, kaj dum 13 jaroj estis ĉefdelegito de UEA en Aŭstrio. Rentmeister dum pluraj jaroj reprezentis sian landon en la Komitato de UEA.

ekzameno
 Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 38

(pri la demando vidu nian numeron de decembro 1980)

Berlino.

DEMANDO 39

(la respondo aperos en nia februara numero)

Ĉi-monate provu vian lertecon en la ŝakludo – ne sur tabulo sed en tiuj ĉi kolumnoj, kiuj enhavas dek demando-pecojn. Kiom vi povas kapti? Ĉu vi sukcesos matigi en dek movoj? La unua ĝusta respondo donas al vi peonon, same kiel la dua. Por la tria, kvara kaj kvina, vi ricevos ĉevalon, kurieron kaj turon respektive. Ses bonaj respondoj metas vin en pozicio por aroki, kaj post ankoraŭ unu bona movo, vi povas damigi pecon. Okaze de la oka trafa respondo vi kaptos la damon. Naŭ

respondoj ebligas al vi ŝakigon, kaj je la deka movo definitivon matigon.

1. Pri kiu aspekto de la historio de la ŝakludo aludas jenaj verslinioj cititaj el *Paradizo* de Dante (Kanto 28, linioj 91-93):

Fajregon sian sekvis ĉiuj eroj
tiom multaj, ke pli ilia nombro
ol duoblo de la ŝak' miliĝas.

2. El kiu mondfama literatura verko venas jena kvarverso, kaj kiu tradukis ĝin Esperanten?

Se tion diri simple, senmetafore, ni
estas ŝakpecoj, kiujn priludas Mond-
geni';
kaj ni, post eta rolo sur la tabul' de
l' vivo,
revenas unuope en keston de l'
Neni'...

3. Unu el la plej fruaj pritraktoj de ŝakterminologio aperis kiel "lingva respondo" de Zamenhof. Ricevinte peton de Th. Thorsteinsson rilate la nomojn de la ŝakpecoj, la aŭtoro de Esperanto faris liston de germanaj kaj Esperantaj terminoj. Poste, du el tiuj naŭ vortoj eksmodiĝis kaj estis anstataŭigitaj per aliaj. Pri kiuj du terminoj temas?

4. En la teatraĵo *Ŝakludado* de la itala aŭtoro Josefo Giacosa, esperantigita de la fratoj P. kaj R. Padulli, kaj eldonita en 1920,

okazas ŝakludo inter tre sperta ludanto, Jolando, la filino de la nobelo Renato, kaj Fernando, juna, fierpaĝio. Kiujn ludkondiĉojn starigis Renato, kaj kiel finiĝis la partio?

5. Kiu eksprezidanto de la Akademio de Esperanto verkis eseon pri la ŝakpecoj, donante detalajn filologiajn donitaĵojn pri la historio de iliaj nomoj en orientaj kaj eŭropaj lingvoj?

6. Kiam okazis la unua propono al la tutmonda organizaĵo de ŝakistoj uzi Esperanton por organizaj aferoj?

Kolekto da noveloj kaj rakontoj de la hungara verkisto Frederiko Karinty estis esperantigita de Karlo Bodó kaj publikigita en 1926 sub la titolo *Norda vento*. Unu el la pecoj, titolita "Cezaro kaj Abu Kair", priskribas du ŝakpartiojn. La sekvaj du demandoj koncernas tiun amuzan verkon.

7. Dum ŝakludo kun la hinda ŝakfervorulo Ben Jussuf, Cezaro evitas maton per surpriza kaj tre neortodoksa movo. Kiel?

8. Abu Kair, la hinda mondmajstro de la ŝakludo, provis apliki ŝakregulojn al vera vivsituationo, en kiu tigro ludis la rolon de ĉevalo kaj Abu Kair estis la kontraŭula reĝo. Kio okazis al li?

9. Laŭ la Jarlibro de UEA (1979) estas 18 fakdelegitoj, kiuj okupiĝas pri ŝakludaj aferoj. Ili certe legas *Esperanta ŝako*. Tiu periodaĵo estas la organo de kiu fakorganizaĵo kunliganta esperantistajn ŝakludantojn?

10. En la novelo "La lasta partio" de Mauro Nervi, kio okazis al "La fama K.", grandmajstro kaj plurfoje mondĉampiono, post kiam li venkis junulon de la hungara teamo en internacia ŝakkonkurso?

FERIADO EN MALTO, MEZE DE MEDITERANEO

Por celebri la 20an datrevenon de sia fondiĝo, Esperanto-Societo (Malto) okazigos

INTERNACIAN TURISMAN SEMAJNON

de la 1-a ĝis la 7-a de septembro 1981. Prospektoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe: Esperanto-Societo (Malto), "La Espero", New Street off Qormi Road, St. Venera, Malto.



Antaŭdankon

por frua pago

de via kotizo

por la jaro 1981

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu memori, ke ni ne donas rabaton pro la ripetado de la anoncetoj.

Inter 31 leteramikoj miaj troviĝas neniue el Svislando, Luksemburgo, Kanariaj Insuloj, Malto kaj Nov-Zelando. Skribu al la familio de la 45-jara teknikisto: Antonin Bombionka, Sokolovská 1178, CS-708 00 Ostrava-Poruba IV, Ĉeĥoslovakio.

Demonstro per ekzemplo: "Rakonto pri admirinda sin-ofero". Prezo (afrankite): 10 francaj frankoj aŭ samvaloraĵo aŭ kvar poŝtkuponoj. Mendu ĉe: F-ino Germaine Kirtz, 5 boulevard Alliés, F-68100 Mulhouse, Francio. Poŝtkonto: 993.48 X F-67900 Strasbourg.

Italaj plenaĝuloj, diversprofesiaj, kaj cent geknaboj 7-12-jaraj, deziras korespondi tutmonde. Bonvolu skribi mallonge, klare, prefere tajpe. Esperanto-Grupo, ĉe Maria Murgioni, Via G. Pepe 19, I-09100 Cagliari, Italujo.

Kun gejunuloj deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj Ilona Fedor, Szépvölgy u. 19, H-3535 Miskolc, Hungario.

Polaj gestudentoj, 19-25-jaraj, deziras korespondi pri literaturo, muziko, turismo ktp. Skribu al: Studenta Esperantista Klubo, SZSP Zarząd Ubjewódzki, ul. 3 Maja 7, PL-40-096 Katowice, Pollando.

Pri filmo kaj vojaĝoj tutmonde volas korespondi 19-jara polino: Justyna Kijak, ul. Katowicka 9, PL-42-263 Wrzoso k/Częstochowy, Pollando.

Instruistoj! Gepatroj! Ĉu viaj infanoj ne volas korespondi kun "onkl(in)o" alilande? Ili mem skribu al Geonkloj Esperantistaj, 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britio. Geonkloj atendas!

Ĉe-kursaroj necesegas tutmonde. La plej – en la tuta mondo: *Esperanto laŭ la patrino metodo*, 320 paĝoj, DM 50,00. La kurso-konversacio nur en Esperanto. August Weide, Nordalbingenweg 65, D-2000 Hamburg 61, FR Germanio. Poŝtkonto: Hamburg 150 58-209.

21-jara studento pri tekniko deziras korespondi: Nikolaj Iliev Mitrojanov, ul. Bajka 42, BG-7101 Bjala, dist. Ruse, Bulgario.

Fotokopioj de elĉerpitaj libroj: La Libroservo de UEA disponas pri preskaŭ cent binditaj fotokopioj de elĉerpitaj libroj. Temas kompreneble pri valoraj malnovaĵoj nenie plu akireblaj, ofte mankantaj eĉ en riĉaj E-bibliotekoj. Petu foje la liston de la pretaj fotokopioj!

Pri aviado, naturo, turismo, serĉas korespondanton 21-jara studento pri aeronaŭtiko: Jędrzej Kaca, ul. Akademicka 6, PL-35-084 Rzeszów, Pollando.

Ĝojigus nin ĉiuspecaj kontribuantoj por ekspozicio aranĝota en julio okaze de 125-jara urbjubileo. Desegnotemoj: muziko, tilio, 125a jubileo. Ĉiuj kontribuantoj ricevos respondon. Esperanto, Postfach 1472, D-5093 Burscheid, FR Germ.

36-jara viro, oficisto de universitato, deziras korespondi kaj interŝanĝi fotojn, bildojn k.s. pri ĉiutagaĵoj. Nisikawa sirosi, RB 104, Tokiwadai 4-2, Itabasi-ku, Tōkyō, 174 Japanio.

Helena kaj Ian Fantom anoncas la alvenon de sia filo Rolf Peter, la 23an de novembro, kun pezo de 3,68 kg.

Por ricevi kvar senpagajn P-EM-eldonaĵojn, skribu! Por-Esperanta Mormonaro, 7222 University Station, Provo, Utah 84602, Usono.

35-jara lernanto, komencanta esperantisto, deziras korespondi kun infanoj el ĝen. lernejoj, tutmonde! J.P. Vluchtman, Postbus 2568, 6401 DB Heerlen, Nederlando.

Letervespero! la 29an de aprilo. Sendu salutojn kaj korespondpetojn al: Astura Esperanto-Asocio, str. Enrique Cangas 25, Gijón (Asturias), Hispanio.

Engex Youth International Ltd. ofertas dum 1981 en Sud-Orienta Anglujo kursojn por lernejoj pri la angla lingvo. Loĝado ĉe anglaj familioj, sperta instruado, ekskursoj. Por grupoj de 16 aŭ pli, 3-semajna kurso kostas 180 pundojn por ĉiu persono. Skribu per adreso: Language Services, 17 High Street, St. Peter's, Broadstairs, Kent, Anglujo.

Internacia Jaro de la Handikapitoj: Esperanto-klubo utiligu la broŝurojn pri plezura kontakto kun personoj handikapitaj: vide *Ne tiel sed ĉi tiel*; move *Ĉu ne eblas ĉi tiel*? Por ne-transpagipovaj ni rezervis kvanton senpage (se eble, aldonu respondkuponon). Mendu ĉe: Esperantisto, V. Speijkstr. 28, 3014 VL Rotterdam.

Disko en Esperanto: impona kanto, popolkantoj, koruso, solkantistoj. Ĉiuj tekstoj sur la koverta. Tia estas la disko *Songpoemo pri ponto*, eldonita de Islanda Esperanto-Asocio. Prezo: 27,90 guldenoj. Havebla ĉe la Libroservo de UEA (kun triona rabato por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj).

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 61 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 15,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (30,00 guldenoj; por Nederlando 31,20 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/43

La sovaĝeco de la ĝisnuna politiko baras la plej bonajn intencojn de ĉiu ŝtatestro. Ĝi blokas ĉiun pozitivan iniciaton, ĉiun emon forlasi la vojon de la homa stulteco por eniri tiun de la homa saĝo. Tial, por liberigi la Homaron de la aktuala risko, kiun estigas la ne plu regebla vetarmado de la du rivalaj blokoj — ambaŭ sin nomas demokratiaj — ne sufiĉas la premo de tria bloko de nacioj sendependaj de ambaŭ. Necesas, ke ili vere aliĝu senmalice al la Superdemokrata Mondorganizo, vole-nevole, por sin savi. Jam la tuta Homaro estas sur la sama barko. Se ĝin englutos la ŝtorma maro, ne saviĝos eĉ la neŭtraluloj; tion trudas la senkompataj leĝoj de la naturo.


♦ Esp/44

Plene senutila estas ĉiu strebo de la eksterblokaj ŝtatoj sin savi. Iliaj gamoj tro mallongas por piedbata atingi la sidvangojn de la ŝtatestroj de la du rivalaj blokoj. Sekve, se ili ne komencos per malsovaĝigo tuja de la politiko mem, pere de la starigo de aŭ aliĝo al Superdemokrata Mondorganizo, tiam ankaŭ ili — la gvidantoj de la neŭtralaj landoj same kiel iliaj

subuloj — tutcerte kaj seneskape, okaze de la tria mondmilito, estos englutitaj en la terure ŝtorman oceanon de la homa stulteco, kiu despote mastras super la homaro, jam de jarmiloj en okcidentaj landoj!

♦ Esp/45

Kien tuŝas la politika rabarto, tie estiĝas pesto. Pesto por cerboj, asocioj, religioj, filantropiaj organizaĵoj kaj aliaj. En la antikva tempo, ĝin pritraktis nur la reĝoj kaj la tribestroj — sed nun enmiksiĝas en ĝi multaj aliaj, eĉ manlaboristoj. Tiu epidemio penetras ĉion, malnobligante eĉ tiujn, kiuj en la antaŭaj epokoj estis la plej noblaj: sacerdotoj, kuracistoj, instruistoj. Fine de la dua jarmilo, miloj da stultaj cerboj trafikas en ĝi, sen posedi la necesan gradon de kompetenteco ĝisdata. Nuntempe, almenaŭ en la okcidento, tiun peston suferas la advokatoj, sacerdotoj kaj inĝenieroj — same kiel la metiistoj, kamparanoj, ministroj kaj helplaboristoj.



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18, I-40065 PIANORO, ITALIAO

en kastelo
'GRESILLON
 de la 29 a de marto
 ĝis la 4 a de aprilo 1981

**RENKONTO de
 INFANOJ**

kursoj, fabrikado de
 ĵurnalo, lumbildoj, skeĉoj
 marionetoj

**PEDAGOGIA
 SEMINARIO**

prelegoj kaj debatoj pri
 kursfarado

informo: esperantista kulturdomo
 49150 BAUGE FRANCIO

BSO/Automation Technology b.v.
 en Utrecht (Nederlando)

baldaŭ ekirigos sian projekton pri:

**Duonaŭtomata tradukado de tekstoj
 en komputilaj retaroj**

Kadre de ĉi tiu projekto, estos eble por studento
 pri lingvistiko kun scipovo de Esperanto labori
 kiel

Staĝanto

dum 4-6 monatoj por kontribui al esploroj pri
 homonimeco, algoritma frazanalizo kaj statistikaj
 aspektoj de Esperanto. Dezirata estas progresinta
 studento kun la ĝenerala lingvistiko kiel ĉefa
 fako, por kiu ĉi tiu staĝo povas servi kiel temo
 por magistriĝa disertacio. Oni povas kalkuli pri
 malavara kompenso de la kostoj de vojaĝado kaj
 restado.

Interesitoj povas kontakti BSO/Automation
 Technology (ing. A.P.M. Witkam, tel. (030) 94
 67 46 aŭ (071) 12 03 67), Postbus 3059, 3502
 GB Utrecht, Nederlando.

**SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ (5a sesio)
 UNIVERSITATO DE LIEĜO (BELGIO)
 05 - 19 de julio 1981**

**S
U
K
,
8
1**

Sekcio E: Ekologio

- 1-a semajno: H. MARINOV (Bulgario),
 Sociekonomia bazo de la nuntempa
 ekologia krizo
- 2-a semajno: H. MARINOV (Bulgario),
 Ekologiaj disponfontoj por elnutrado
 de la loĝantaro

Sekcio P: Pedagogio

- 1-a semajno: H. FRANK (FR Germanio),
 Propedeŭtiko de la klerigscienco
 prospektiva
- 2-a semajno: P. DENOËL (Belgio),
 Elementoj de la homa fiziologio en
 rilato kun la edukado
 S. LEHRL (FR Germanio),
 Enkonduko en la informpsikologion
 kaj ties pedagogian aplikon

Ĉiu kurso estas semajna kaj ampleksas
 12 aŭ 18 lecionojn po 45 minutoj, kiuj
 okazas de lundo ĝis vendredo. Eblas sekvi
 unu aŭ plurajn kursojn, eĉ en ambaŭ
 sekcioj. Ekzamenoj. Kulturaj aranĝoj.
 Perfekta Esperanto-kurso.

KOTIZOJ: Programkostoj (unu kurso
 dum unu semajno): 1 200 bf; studentoj
 900 bf. Restadkostoj (sen tagmanĝoj;
 modifeblaj): ĉ. 2 500 bf semajne. Perfek-
 tiga Esperanto-kurso (semajne): 500 bf.

*Petu detalajn
 informojn kaj
 aliĝilon ĉe:
 SOMERAJ
 UNIVERSITA-
 TAJ KURSOJ,
 Boîte Postale 9,
 B - Liège X,
 Belgio.*

**ĈU VI JAM MALKOVRIS ĈI TIUN
 UNIKAN PERIODAĴON EN LA
 INTERNACIA LINGVO?**

MONATO

internacia magazino sendependa

**Eldonanto: Torben Kehlet / STAFETO
 Ĉefredaktoro: Stefan MAUL**

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu
 kajeroj jare. Jara abono: 49,50 gmk aŭ
 800,- b.fr. La abonon bonvolu sendi rekte
 al la eldonejo: TK/STAFETO p.v.b.a.,
 Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Bel-
 gio. Poŝtĉekkonto je la nomo de la eldon-
 ejo estas: 000-0422856-33.

**Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de "MONATO",
 petu provekzempleron kontraŭ du internaciaj res-
 pondkuponoj. (Vi tamen memoru, ke unu persono
 povas nur unufoje fari tian peton). Antaŭdankon!**